


ESPERANTO



La Kongresejo — La Kongreso startas: Hisado de la flagoj

N-ro 610 (9)



Septembro 1956

REVUO INTERNACIA

Revuo Internacia

N-ro 610 (9)

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio

(En Konsultaj Arangoj kun U.N.E.S.C.O)

Fondinto: H. HODLER

* * *

Honora Redaktoro: HANS JAKOB

* * *

Cion por la redakcio oni sendu al la
Redaktoro: W. AULD

Knockfarril, Thornsidge Road, Johnstone, Renfrew-
shire, Skotlando.

* * *

Cion pri administrado de UEA kaj de la revuo
ESPERANTO (abonado, reklamoj, anoncetoj)
sendu al UNIVERSALA ESPERANTO-ASO-
CIO, Eendrachtsweg 7, Rotterdam C, Nederlando.
Telefono: Rotterdam 128313. Ĝirkonto: 378964.

* * *

Bankisto de U.E.A.:

R. Mees & Zoonen, Blaak 10, Rotterdam C.

Traduko kaj represo de artikoloj estas permesataj,
kondiĉe ke oni citu la fonton. Oni sendu tian
represadon al nia redakcio.

Jara abono (1956): 7.50 n.gld. (kun membreco kaj
jarlibro 10 n.gld.)

Cefdelegitoj kaj Perantoj en multaj landoj.

* * *

Tarifo por reklamoj:

1 paĝo	128.— gld	1/2 paĝo	64.— gld
1/4 paĝo	32.— gld	1/8 paĝo	16.— gld
		1/16 paĝo	8.— gld

Anoncetoj pri korespondado:

0,10 gld por unu vorto aŭ 1 int. respondkupono por
ĉiu du da vortoj.

Legantoj en 80 landoj

Estraro de U.E.A.:

Prof. D-ro Giorgio Canuto, prezidanto, Ospedale
Maggiore, Parma, Italujo.

P. M. Mabesoone, vic-prezidanto, estrarano pri
financoj, Pythagorasstraat 122, Amsterdam-O,
Nederlando.

H. W. Holmes, O.B.E., vic-prezidanto, 38, Fille-
brook Road, London E 11, Britujo.

Prof. D-ro Ivo Lapenna, ĝenerala sekretario,
77 Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex,
Britujo.

R. Llech-Walter, estrarano pri kongresoj, 5 Quai
Vauban, Perpignan (Pyr. Or.), Francujo.

D-ro Inĝ. Giordano Azzi, estrarano pri kulturaj
aferoj, viale Giulio Cesare 20, Como, Italujo.

D-ro W. Herrmann, estrarano pri landaj kaj fakaj
asocioj, Bürstädterstr. 3, (16) Lampertheim-
Hessen, Germanujo.

Centro de Esploro kaj Dokumentado

77, Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex
Britujo. Telefono: ARNold 90-81.

ENHAVO

La Plej Universala Postmilita Kongreso . . .	121
Novaj Libroj	137
Tra la Movado	139
Pigmaliono de G. B. Shaw esperantlingve en Praha	140
La Kronprincino de Nederlando kaj Esperanto	141

Rubrikoj

Esperantista Vivo kaj Nekrologo	141
Nia Forumo	142
La Internaciaj Konkursoj	142
Oficiala Informilo	143
Radio	144

La plej Universala Postmilita Kongreso

Ĉiu el la Universalaj Kongresoj de Esperanto posedas iun specialan karakterizon, kiu distingas ĝin de la aliaj. La ĵus okazinta 41-a Kongreso havis tiom da pozitivaj elementoj, ke estas neeble kvalifiki ĝin per unu sola ĝusta esprimo.

Unuavice ĝin karakterizas la granda nombro da partoprenintoj — fakte pli ol 2200 — reprezentantaj 44 landojn. Se oni konsideras, ke el pluraj ŝtatoj venis delegitoj de diversaj naciecoj kaj gepatraj lingvoj, ne estas troigo diri, ke kvindeko da nacioj estis reprezentitaj. Post multaj jaroj la ĉefan manifestacion de la Internacia Lingvo kaj de Esperantismo ĉeestis ankaŭ la senditoj de la Esperanto-organizaĵoj en Pollando, Hungarujo, Bulgarujo kaj Ĉeĥoslovakio. Venis esperantistoj el Japanujo, Irano, Vietnamo, Ĉinujo.

Ĉeestis ankaŭ reprezentantoj el Afriko, Nov-Zelando, Usono, Suda Ameriko. Salutaj mesaĝoj alvenis eĉ el Sovetunio. Ĝi estis la plej universala el la postmilitaj kongresoj kaj verŝajne la plej universala kongreso entute. Tiu ĝojiga fakto, en kunligo kun la konsiderinda kresko de la membraro de UEA kaj ĝia konstanta larĝiĝo per novaj aliĝoj de landaj asocioj — 5 pliaj estis akceptitaj en la lastaj semajnoj — klare montras ne nur la revigliĝon de la tuta movado en ĉiuj partoj de la mondo, sed ankaŭ la taŭgecon de la nunaj organizformoj de UEA kaj la apogon, kiun la esperantistaro donas ĉiam pli amase al ĝiaj ampleksaj laboroj.

De jaro al jaro niaj kongresoj ricevis ĉiam pli akcentitan laboran karakteron. Kopenhago ankaŭ tiurilate atingis kulminon en la ĝisnuna evoluo. Oni intense laboradis dum unu tuta semajno ĉie: en la tri sekcioj, en la ĝeneralaj kunvenoj, en la fakaj kunsidoj, en la Komitato kaj Estraro de UEA, en la Akademio. Oni rapidis de unu kunveno aŭ kunsido al la alia por kontribui al progresigo de la afero sur diversaj kampoj. Ĝi estis unu el la plej laboraj kongresoj.

La edukaj kaj artaj aranĝoj — ISU, Belartaj Konkursoj, prelegoj k.a. — estis ne nur klerigaj

kaj instruaj, sed donis al la kongreso ankaŭ fortan noton de elstara internacia kultura manifestacio. La danaj gazetaro kaj radio, kiel ankaŭ la diversaj observantoj, tion bone rimarkis kaj substrekis. Impona estis la festo de la 50-jara jubileo de ISAE.

Surprize granda estis la nombro de gejunuloj. Fakto tre kuraĝiga, des pli ke ĝenerale — kun kelkaj esceptoj — ili vere bone regis la lingvon.

Aŭskultante la intervenojn de la pli junaj esperantistoj en la tria sekcio kaj en la aliaj organoj kaj instancoj de la kongreso, oni povis kun granda plezuro konstati, ke la nova generacio de esperantistoj konsistas el seriozaj junaj homoj, por kiuj Esperanto ne estas ia sensignifa ludilo, sed grava socia faktoro. La balo havis junecan aspekton. Multe pli ol en la antaŭaj jaroj. En tiu agordo ankaŭ la grizharuloj vigliĝis. Sed, kiel dirite, nia junularo ne estis videbla nur en la distraj aranĝoj, kiel tiel ofte okazadis pli frue. Ĉifoje ĝi sindone kaj efike partoprenis ankaŭ en la laboroj.

El teknika vidpunkto la kongreso estis perfekte organizita. Al tio certe multe helpis la belega kongresejo, unu el la plej

konvenaj kiun ni iam havis. Krom kelkaj grandaj aranĝoj — la Inaŭguro, la Interkona Vespere, la Balo kaj la Teatra Vespere — ĉio alia estis centrigita en la kongresejo mem. Tio, kiel ankaŭ la rigora observado de akurata komenciĝo de ĉiuj kunvenoj, prelegoj kaj aliaj aranĝoj, rezultigis glatan kaj precizan funkciadon de ĉio laŭ antaŭvidita programo. Oni devas rekoni, ke ankaŭ la kongresanoj montriĝis tre disciplinitaj. Dank' al tiuj precizeco, akurateco kaj disciplino la pli ol abunda tagordo de la kongreso povis esti ĝustatempe kaj kontentige plenumita.

La tuta Loka Kongresa Komitato sub prezido de S-ro G. Kühlmann, komitatano de UEA, la multnombraj helpantoj en la diversaj servoj kaj la nova Konstanta Kongresa Sekretario, S-ro Gian Carlo Fighiera, meritas tutkoran dankon pro la brila organizo de la 41-a Universala Kongreso de Esperanto.

I. L.



*Prof. D-ro Giorgio Canuto
Rektoro de la Universitato de Parma,
dum la 41-a Universala Kongreso de Esperanto
elektita kiel Prezidanto de U.E.A.*

LA SOLENA INAŬURO

En la belega, moderna koncerthalo de Tivoli dimanĉon matene je la 10-a horo 2200 kongresanoj el 45 landoj facile trovis lokon por ĉeesti la Solenan Inaŭguron, tiun plej imponan eventon de ĉiu Universala Kongreso.



Enkondukite de lurblovado S-ro Ernst Christiansen alparolas la Kongreson

En la nomo de la protektanto de la 41-a, ĉefministro H. C. Hansen, alparolis kiel unua la kongreson lia anstataŭanto S-ro Ernst Christiansen, vic-ministro pri Eksterlandaj Aferoj. Urbestro Ingvar Dahl bonvenigis la kongreson al Kopenhago. Enkondukis ambaŭ aŭtoritatulojn lurblovado, kiu momenton transmetis la publikon en Vikingan tempon kaj donis folkloran ĉarmon al la solenaĵo.

La prezidanto de UEA, S-ro Ernfrid Malmgren, dankis ambaŭ parolintojn, aparte bonvenigis Mag. Rosenkjaer kiel reprezentanton de la instru-ministro de Danlando kaj post mallonga parolado deklaris la kongreson malfermita. Post bonvenigaj



Malferma parolado de S-ro Ernfrid Malmgren, Prezidanto de U.E.A.

vortoj de la prezidanto de LKK, S-ro G. Kühlmann, salutis la kongreson unue la reprezentantoj de registaroj.

Por la **aŭstra** registaro parolis *Chargé d'Affaires* Emanuel Helige; por la **finna** parolis la konata esperantistino kaj ministro pri sociaj aferoj S.ino Tyyne Leivo-Larsson, kiu akcentis ke la Internacia lingvo estas nepre bezono por la malgrandaj landoj; por la **franca** parolis S-ro Petit, komitatano de UEA; por la **nederlanda** registaro parolis la dudekkvinan fojon en Universala Kongreso S-ro Ing. J. R. G. Isbrucker, prezidanto de la Akademio de Esperanto; por la **belga** parolis S-ro J. Hérion; por la **norvega** parolis Kap. R. Bugge-Paulsen, kiu tuŝis la lingvan diskriminacion kaj la sufokan premon de la grandaj potencoj sentatan en la nordaj landoj; por la **sveda** registaro parolis rektoro K. Söderberg; kiu akcentis, ke lingva kompreno estas esenca kondiĉo por interpopola konkordo.



La kongresanaro dum la Inaŭgura Solenaĵo

La antaŭa kongresurbo Bologna sendis oficialan delegacion al la nunjara kongreso. En ĝia nomo parolis en Esperanto Prof. Belletini.

Salutis la kongreson la reprezentantoj de la esperantistaj landaj asocioj aliĝintaj la UEA. Parolis por la **argentina** S-ro W. M. Goodes, por la **aŭstra** S-ro W. Mudrak, por **flandra** kaj **belga** ligoj S-ro R. Van Eynde, por la **brita** asocio S-ro W. M. Goodes, por la **dana** S-ro S. Dragsted, por la **finna** S-ro V. Setälä, por la **franca** S-ro R. Llech-Walter, por la **germana** D-ro W. Herrmann, por la **itala** D-ro G. Azzi, por la **jugoslavio** S-ro P. Zlatnar, por la **maroka** S-ro C. Thollet, por la **nederlanda** S-ro J. Albers, por la **norvega** lekt. C. Støp-Bowitz, por la **nov-zelanda** S-ro B. Potts, por la **pola** ing. A. Rajski, por la **sveda** S-ro J. Strønne, por la **svisa** D-ro W. Perrenoud, por la **usonaj** D-ro W. Solzbacher kaj S-ro A. Doneis.

Sekvis reprezentantoj de landaj asocioj ne-aligintaj al UEA. Parolis por la bulgara S.ino T. Petkova, por la ĉina S-ro Yeh Laishi, por la greka F.ino H. Polimeropoulou, por la islanda S-ro H. Kolbeins, por la izraela S-ro P. Sammelsdorf, por la japana Prof. T. Nakayama, por la meksika S-ro F. Azorin, por la sarlanda S-ro G. Becker. El landoj kie ne ekzistas landa asocio salutis por Irano D-ro P. Zoleyn, por Venezuelo S-ro Alberto Diaz, por Vietnamo S-ro Thi Vo-Van. Nur unu minuton ricevis ĉiu parolanto kaj preskaŭ ĉiu disciplinite submetiĝis al tiu preskribo necesa por bona evoluo de la inaŭgura solenaĵo. Tiuj mallongaj minutoj tamen sufiĉis por pruvi unu plian fojon la mirindecon de la Internacia lingvo kiel rekta komprenilo kaj la egalecon de la elparolo en plej diversaj mondpartoj.

Faris la festparoladon Prof. D-ro Ivo Lapenna, ĝenerala sekretario de UEA, streĉe aŭskultata kaj plurfoje interrompita de aprobaj aplaŭdoj kiuj montris, ke la oratoro esprimis la pensojn kaj sentojn de ĉiuj sinceraj esperantistoj. Resumo de la enhavo, kiu traktis la ideologion de esperantismo kaj substrekis la universalecon kaj neŭtralitecon de UEA, troviĝas ĉi sube. Per komuna kantado de la himno finiĝis la solenaĵo.



FESTPAROLADO DE PROF. IVO LAPENNA

(Resumo)

Varme salutita de la tuta Kongreso, la Ĝenerala Sekretario de U.E.A. enkonduke akcentis la gravajn teknikajn, sociajn, politikajn, ideologiajn kaj kulturajn ŝanĝojn, kiuj faras ke la mallonga periodo de la lastaj jardekoj povas prave esti konsiderata kiel mejloŝtono en la historia evoluo. Unu el la plej signifaj eventoj estas la formiĝo kaj socia enradikiĝo de la Internacia Lingvo, al kio kontribuis miloj da personoj tra la mondo kree verkante en la lingvo, disvastigante ĝin kaj aplikante ĝin ĉiam pli efike sur plej diversaj kampoj de la internacia vivo. La oratoro menciis plurajn kortuŝajn ekzemplojn de sindono kaj oferemo eĉ en la plej malfacilaj kondiĉoj, dum la milito, en tranĉeoj kaj koncentrejoj. Li daŭrigis:

Ekestas demando kio igis kaj igas tiujn homojn oferi sian tempon kaj energion, riski kelkfoje sian bonstaton aŭ eĉ la vivon por diskonigi la lingvon. Ĉu nur la facileco de Esperanto, ĉu nur la fakto, ke per ĝi la homoj povas komuniki unu kun la alia, aŭ ankaŭ io pli grava kaj pli profunda?

Estas precize la demando, kiu kiel ruĝa fadeno treniĝas tra la tuta historio de la Esperanto-Movado kaj kiu povas koncize esprimiĝi: Ĉu la Esperantismo havas ideologiajn elementojn, aŭ ĝi estas nur pure teknika porlingva movado?

Estas tute certe, ke objekte la Internacia Lingvo povis ekesti nur kiam ĉiuj kondiĉoj maturiĝis por tio. Sed aliflanke estas ankaŭ sendube, ke la intergenta malamo, reganta en la urbo Bjalistok, inspiris la junan Zamenhof serĉi solvon per kreo de lingvo komune homa. Parton de sia granda kaj nobla animo la aŭtoro enspiris en sian verkon. Tiele Esperanto naskiĝis kiel lingvo de pacigo kaj de amo.

En la movado ek de ĝia komenco estis — kaj mi opinias ke estas ankaŭ hodiaŭ — du tendencoj: tiu, kiu vidas la lingvon nur kiel teknikan instrumenton de komunikado kaj tiu, kiu ligas al ĝi iujn ideojn. La Bulonja Kongreso, kiel konate, akcentis ke la Esperantismo estas penado disvastigi tra la mondo lingvon neŭtrale homan. Sed jam la sekvintan jaron Zamenhof dum la Kongreso deklaris, ke kun tia Esperanto, kiu devus servi nur praktikajn celojn, li deziris havi nenion komunan.

Ankaŭ ekster la esperantistaj medioj — mi aludas al diversaj projektantoj de ĉiam novaj projektoj de komuna lingvo — oni opinias, ke tia lingvo ne povas havi ian idearon ligitan al si, sed ke ĝi devas servi nur por teknikaj rilatoj, do kiel pure teknika instrumento.

Se ni esploras en ni mem la motivojn, kiuj instigis nin eklerni la lingvon, ni trovos sufiĉe grandan diversecon. Mi mem ekinteresiĝis pri Esperanto jam en gimnazio tute simple tial, ĉar min ĝenis la granda malfacileco de la naciaj lingvoj kaj la minimumaj rezultoj atingataj post multjara pena studado. Sed kiam mi ĉeestis mian unuan Univerŝalan Kongreson en Budapeŝto en 1929, mi spertis dum la solena malfermo ĝis tiam nekonatan spiritan sensacion. Aŭskultante la diversajn oratorojn — mi ne plu memoras la nomojn nek la enhavon — mi komprenis, ke ĉi tie ne temas nur pri rekta komunikado de homo al homo, sed pri io multe pli grava. La solena inaŭguro de tiu Kongreso malfermis por mi la fenestron al la mondo, kaj mi la unuan fojon profunde sentis la veran sencon de la principo pri egaleco de la homoj super la rasaj, naciaj kaj aliaj diferencoj, kion pli frue mi povis nur intelekte koncepti. La inaŭgura solenaĵo de tiu Kongreso stampis pli ol io alia mian menson kaj fiksis la linion de mia vivo; tiun linion, kiu en la postaj jaroj donis al mi multe da ĝojoj kaj feliĉo, sed ankaŭ, kelkfoje almenaŭ, plurajn tre ĉagrenajn momentojn.

Eble oni diros, ke tio estas afero de sentoj subjektivaj, kiu ne toleras objektivan kritikon. Viaj aplaŭdoj montras, ke vi havas samajn sentojn. Ankaŭ ili estas subjektivaj. Entute, oni emas riproĉi al ni esperantistoj, ke ni estas subjektivaj.

Se ni eksplikas Esperanton, se ni parolas pri ĝia tre alta grado de perfekteco kaj pri la grandaj kulturaj valoroj kreitaj en ĝi, tiam, kompreneble, ni estas subjektivaj! Kaj ni estas subjektivaj ĝuste tial, ĉar ni scias pri kio ni parolas. Male, tiuj, kiuj komplete ignoras ion ajn pri Esperanto, estas alte objektivaj. Ĝuste tial, denove kompreneble, ĉar ili ne havas ideon pri la afero! Sed ni lasu tion.

Nu, se ni objekte jetas nur supraĵan rigardon al la traktata demando, ni facile konstatas, ke ĉiu lingvo estas esprimilo de iu homa kolektivo, de iu homgrupo, ĉu triba, ĉu religia, ĉu klasa, kasta, nacia aŭ internacia. Ĉiam, kiam iu socia grupo fariĝas konscia pri si mem, ĝi paralele kreas al si sian lingvon. Kaj ĉiam tia lingvo estis kaj estas la ĉefa — ne la sola — kuntenilo de la grupo, la lingvo fortikigas ĝian unuecon. Tial la lukto por la lingvo estas lukto por la ekzisto de la socia grupo kiel tia. Tial ĝi ankaŭ estas tiel inspira. Kaj estas tute nature, ke al tiuj sentoj aldoniĝas eksteraj signoj en formo de flagoj, muzikoj, fanfaroj kaj himnoj.

Oni riproĉas al ni tion, sed oni forgesas, ke ĉiuj lingvoj, almenaŭ ĉiuj modernaj naciaj lingvoj, naskiĝis kun la sama pompo. La diferenco estas nur, ke nia himno, nia flago, nia stelo, niaj manifestacioj estas inspiritaj de pacamo kaj respekto al la homo, dum la aliaj ne malofte, milde dirite, semas malkonkordon. Mi certe ne estas unu el tiuj, kiuj aprobas la troan elmontron de interna fervoro per tiaspecaj eksteraj signoj, sed mi deziras nur ekspliki ilian aperon ankaŭ en la movado por tuthoma lingvo.

Kion ĉio ĉi signifas? Ĝi signifas ke la Internacia Lingvo estas esence, laŭ la naturo mem de la afero, ligita al iuj ideoj. Tiuj ideoj estas:

Unue, egaleco de ĉiuj rasoj kaj nacioj, do, neta kaj senkompromisa kontraŭrasismo;

Due, tuthoma solidareco kaj respekto al la homaj rajtoj, esprimitaj nun en la Universala Deklaracio de la Homaj Rajtoj, do energia kontraŭmilitismo;

Trie, libereco, ĉar nur en plena libereco floras la egaleco kaj fortikiĝas la solidareco.

Tiuj estas la minimumaj ideologiaj elementoj de Esperantismo, elementoj kun kiuj la lingvo aŭ vivas aŭ mortas, sed sen kiuj ĝi ne estas imagebla

kiel lingvo vivanta de vivanta internacia kolektivo. Ilin oni povas konscie akcepti — kaj mi kun fiero tion faras — aŭ ne akcepti. Tio ne multon ŝanĝas en la afero. Ili estas reale ekzistantaj kaj efikaj ne malofte ankaŭ se oni ne akceptas ilin konscie.

La menciitaj ideologiaj elementoj samtempe difinas la neŭtralecon de nia movado kaj speciale de Universala Esperanto-Asocio kiel ĝia ĉefa reprezentanto. U.E.A. estis, devas esti kaj restos strikte neŭtrala rilate al religio, politiko, sociaj demandoj kaj nacieco kaj ĝiaj pordoj estas larĝe malfermitaj por ĉiuj, kiuj respektas tiujn fundamentajn principojn. Sed la Esperanto-movado ne estas kaj ne povas esti neŭtrala rilate tiujn movadojn, kiuj kontraŭas la Internacian Lingvon kiel tian kaj detruas la ideologiajn bazojn mem, sur kiuj sole povas kreski kaj prosperi Esperanto. Esti indiferenta koncerne la rektajn atakojn rilate Esperanton kaj Esperantismon ne estas neŭtraleco,

sed malkuraĝo kaj stulteco. (Forta aplaŭdo.)

Tia konceptado de la Esperantismo kreas ankaŭ devojn: devon por la movado kiel tuto firme defendi siajn poziciojn; devon por ĉiu individuo agi laŭ tiuj principoj. Vi komprenas, ke ĉi tie temas pri lojaleco. La homo, apartenanta al diversaj sociaj grupoj — al sia familio, al sia urbo, al sia provinco, al la nacio kaj al la homaro — ŝuldas al ĉiu el ili sian lojalecon. Mi opinias, ke en bone ordigita mondo ne povas ekzisti konflikto inter la diversaj lojalecoj, sed ke ili devas harmonie ekzisti unu apud la alia. Lojaleco al la familio ne ekskludas lojalecon al la nacio kaj inverse, nek lojaleco al la nacio ekskludas tiun, kiu estas ŝuldata al la homaro. Tamen povas okazi, kaj fakte okazis, ke la homo devas elekti inter du lojalecoj, ĉar la cirkonstancoj devigas lin al tiu paŝo. Pensu nur al la sennombraj kazoj de tiaj lojaleckonfliktoj, kiujn elvokis la pasinta milito, kiam unuopulo devis decidiĝi aŭ por la reĝimo de sia propra nacio, kiun li konsideris maljusta kaj kontraŭa al la konscienco, aŭ por lojaleco al la homaro. Ne ĉiuj trovis la necesan energion kaj fidon por agi laŭ la principoj diktataj de la konscienco, sed multaj tamen elektis la ĝustan vojon. En tiaj okazoj la noblaj principoj de la Esperantismo estu por ni ĉiuj klara indikilo, kaj ni senhezite sekvu la montratan vojon. Tiu spirito regu ankaŭ la laborojn de la 41-a Universala Kongreso de Esperanto!



Prof. D-ro Ivo Lapenna,
Jura konsultisto pri Internacia Juro en Londono,
dum tiu ĉi
Kongreso reelektita kiel Ĝenerala Sekretario
de U.E.A.

LA ĈEFAJ KULTURAJ ARANĜOJ

Ni opinias, ke estas necese dediĉi al la ĉefaj kulturaj aranĝoj de la Kongreso apartan ĉapitron pro la graveco kiun ili havas por la riĉigo de la intelektaj valoroj en Esperanto kaj ankaŭ por la evoluo de la lingvo mem.

I.S.U.

La 9-a laborperiodo de Internacia Somera Universitato komenciĝis dimanĉon vespere en la plena salonego Zamenhof per la parolado de la ĉi-jara rektoro, **D-ro Paul Neergaard**. Li bonvenigis la profesorojn kaj la aŭskultantojn. Tuj poste, je la 19.45, okazis la unua prelego, tiu de **Prof. D-ro Giorgio Canuto**, ordinara profesoro pri jurmedicino kaj Rektoro de la Universitato en Parma. En sia prelego pri „La Mensogdetektilo kaj ĝiaj Eblaj Aplikoj” la preleginto prezentis la plej novajn studojn pri la emocio kaj la scienca bazo de la aparato por malkovri la mensogojn. Li analizis la praktikan kaj juran valorojn de la ĝis nun atingitaj rezultoj.

La saman vesperon **Prof. Gaston Waringhien**, agregacia profesoro el Parizo, parolis pri la „Evoluo de la Fundamento de Esperanto”. Li montris, ke la Fundamento restis la efektiva bazo de la lingvo, sed ke aliflanke tiun aserton oni ne devas kompreni en absoluta senco, ĉar ankaŭ la vortoj de la Fundamento, kvankam ili ne suferis ŝanĝon en sia formo, evoluis kun la tempo.

Prof. D-ro Hugo Sirk, emerita profesoro pri fiziko en la Universitato de Vieno, prelegis pri la temo „Ĉu oni Povas Vidi la Atomojn”. Ĉi-foje la eminenta aŭstra fizikisto havis je dispono plurajn aparatojn kaj instrumentojn, kio multe helpis la eksplikon de la malfacila temo.

D-ro Paul Neergaard, doktoro pri agronomio, privatdocento kaj sekciestro de Ŝtata Plantpatologia Servo, faris streĉe interesan prelegon pri la disvastiĝo de mikroboj sur la tero.

Prof. D-ro W. E. Collinson, emerita profesoro de la Universitato de Liverpool, M. A. de la Universitato de Londono, Dr. Phil. de la Universitato de Heidelberg kaj Fellow de la „University College” en Londono prelegis pri la temo „Lingvoj en Kontakto” en la kadro de la Ora Jubileo de I.S.A.E., pri kio ni raportas aliloke.

Rektoro Karl Söderberg, licenciato pri filozofio kaj Direktoro pri la komunumaj lernejoj en Uppsala, parolis pri la ebloj kaj devoj de la socio por utiligi la talentulojn. Li akcentis, ke estas fundamenta demokrata principo, ke ĉiu civitano havu la saman rajton eluzi la publikan edukadon.

Komunuma instruisto Poul Thorsen, instruisto pri dana lingvo kaj literaturo en Kopenhago prezentis la vivojn kaj verkojn de tri danaj Nobel-

premiitoj: Karl Gjellerup, Henrik Pontoppidan, Johannes V. Jensen.

Lektoro C. Støp-Bowitz, Kuratoro de la Zooloĝia muzeo en Oslo elektis kiel temon de sia prelego la demandon pri la estiĝo de la homo kaj en ĝi li prezentis la rezultojn de la plej novaj esploroj. Tiu-ĉi prelego estis en kunligo kun la serio da prelegoj, kiujn li faris antaŭ la kongreso en la Sveda Somera Semajno en Frostavallen.

Prof. D-ro Ivo Lapenna, eksprofesoro pri Internacia Publika Juro en la Universitato de Zagreb, membro de „International Law Association” en Londono, nun Jura Konsultisto pri Internacia Juro en Londono, prelegis pri la temo „La Maro en la Internacia Juro”. En ĝi li prezentis la diversajn jurajn reĝimojn, kiuj reguligas la liberan maron, la teritoriajn akvojn, la internajn marojn, la apudan zonon, la kontinentan breton.

Prof. D-ro Juan Régulo Pérez, agregacia profesoro pri romanida lingvistiko en la Universitato de La Laguna elvolvis en sia prelego la estiĝon, evoluon kaj faktan geografian bazon de diversaj mitoj kaj legendoj rilatantaj al Kanarioj.

Dek prelegintoj de 8 nacioj, variaj kaj interesaj temoj, science altnivela, sed tamen populara ekspliko, multnombra aŭdantaro apartenanta al kvardeko da nacioj, ĉio-ĉi kunligita per unu sola lingvo — jen plej koncize la karakterizo de tiu ĉi unika kultura institucio en la hodiaŭa mondo. Oni atendis kun granda intereso la anoncitan prelegon de **Prof. D-ro Gurgun Sevak**, doktoro pri filologio kaj profesoro pri la armena lingvo en la Ŝtata Universitato de Erevan, sed bedaŭrinde tiu prelego ne povis okazi, ĉar la prelegonto estis malhelpita veturi al Kopenhago.

BELARTA KONKURSO

La ĉi-jara Belarta Konkurso estis la plej granda kaj laŭ la nombro de konkursaĵoj kaj laŭ tiu de la konkursantoj: 116 konkursaĵoj de 40 konkursantoj el 18 landoj estis juĝataj de la prijuĝa komisiono.

En la branĉo Originala Poezio la unuan premion gajnis Juan de Oyarzabal, Meksiko, pro la poemo „Fluadoj”. La duan premion ricevis Claude Piron, Belgujo, pro la poemo „La Suferoj de Aliaj”. La trian premion ricevis Enrico Dondi, Italujo, pro la poemo „Novembro”.

Enrico Dondi gajnis ankaŭ la unuan kaj trian premiojn en la branĉo Traduka Poezio, dum William Auld, Skotlando, ricevis la duan premion pro la traduko de „Eseo pri la Tradukado” (Pope). La premiitaj tradukoj de Dondi estas el la „Paradizo” (Dante) kaj „La Morto de Clorinda” (T. Tasso).

En la branĉo Originala Prozo la komisiono ne aljuĝis la unuan premion. La duan premion ricevis Marjorie Boulton pro la novelo „La Lernantino”, dum f-ino W. M. Smit, Nederlando, ricevis la

trian premion pro la novelo „Por ke li ne Sentu”.

Ankaŭ en la branĉo Originala Drameto ne estis aljuĝita la unua premio. Bozidar Trudiĉ, Jugoslavio, ricevis la duan premion pro „La Malamiko” kaj Marjorie Boulton, Britujo, la trian pro „2056”.

Ci-foje la konkurso havis ankaŭ Kongreslandan Branĉon. La solan premion ricevis C. Graversen, Danlando, pro la traduko de „Jorden” de Emil Aarestrup.

La Romankonkurso, anoncita en la jaro 1954, vekis kontentigan interesiĝon. La unua premio ne estis aljuĝita. La dua premio dividiĝas inter Stefan Zodel, Aŭstrujo, pro la konkursaĵo „Senkonsila Amo” kaj Agostino Brizzi, Italujo, pro la verko „Simonaco”. La konkursaĵo „Interplaneda Kongreso” de R. Q. Pellico, Hispanujo, ne povis esti konsiderata kiel romano, pro siaj eksterkategoriaj trajtoj, sed el aliaj vidpunktoj, laŭ la opinio de la komisiono, ĝi havas laŭdindajn kvalitojn.

Pluraj konkursaĵoj ricevis laŭdajn menciojn, kvankam al ili ne estis aljuĝitaj premioj. Entute, laŭ la landoj, premiojn aŭ laŭdajn menciojn ricevis: Italujo 5, Anglujo 3, Skotlando 1, Danlando 2, Ĉeĥoslovakujo 3, Meksiko, Belgujo, Norvegujo, Svedlando, Brazilo, Nederlando, Hispanujo kaj Aŭstrujo po 1, tio estas 13 landoj kun entute 22 distingoj. Vere abunda rikolto, kiu montras la interesiĝon de niaj poetoj kaj verkistoj por la Belartaj Konkursoj.

La du poeziajn branĉojn prijuĝis E. A. Haugen, Prof. La Colla kaj Prof. G. Waringhien; la du prozajn branĉojn R. Bernard, Luis Hernandez kaj D-ro F. Szilágyi; la romankonkurson redaktoro T. Jung, Doc. Régulo Pérez kaj D-ro Szilágyi; la kongreslanda branĉo havis la helpon de H. E. Jensen, Poul Thorsen kaj E. Windeballe. Sekve la juĝantaro apartenis al 6 landoj: Danlando, Francujo, Italujo, Hispanujo, Nederlando kaj Svedlando.

Mardon posttagmeze je la 16-a horo kolektiĝis en la salono Grabowski tre granda nombro da kongresanoj por aŭdi la rezulton de la konkurso kaj la legadon de la premiitaj verkoj. La sekretario D-ro Szilágyi proklamis la rezultojn kaj poste kelkaj el la premiitaj verkoj estis legitaj de Julio Baghy, kies aperon la publiko salutis per tondra aplaŭdo, Srdjan Flego, Carlo Minnaja, Poul Thorsen, Marjorie Boulton mem legis sian premiitan novelon. Inter la unuopaj eroj f-ino Birthe Traerup tre ĉarme kantis diversnaciajn popolkantojn en Esperanta traduko, kio multe vigligis la tutan aranĝon.

Esta tre bedaŭrinde, ke tiu ĉi aranĝo ne okazis en la bela kaj granda salono Zamenhof. Severa lerneja ĉambro ne estas konvena por tiaspeca aranĝo, kiu nepre bezonas taŭgan agordon. Krome, la salono Grabowski estis tro malgranda kaj multaj ne povis eniri. En la sekvantaj kongresoj estos necese disponigi por la Belarta Konkurso salonon kun pli da etoso kaj animo.

TEATRA VESPERO

Kiam ni petis F-inon Marjorie Boulton verki kelkajn kritikajn rimarkojn pri la teatra vespero, ŝi tuj demandis laŭ kiu kriterio kaj el kiu vidpunkto. Ni ne hezitis respondi: laŭ la sama, laŭ kiu vi juĝus teatraĵojn, prezentitajn en kiu ajn nacia lingvo; ni jam tiom progresis, ke ni povas komenci taksu la esperantlingvajn prezentadojn laŭ pli severaj kriterioj. Jen kion ŝi sendis al la Redakcio:

Je la 7,30 lundon vespere la kongresanoj amasiĝis en la belega, impona, moderna kaj luksa koncertejo de Tivoli por aŭskulti tri unuaktajn danajn drametojn, tradukitajn en modelan Esperanton de A. Andersen, G. Kühlmann, kaj E. Windeballe. Estis ja plaĉe, ke plia ero de la Kongreso povis okazi en tiel digna kaj bela ejo.

Bedaŭrinde, ejo destinita al muzikaj prezentadoj ne perfekte taŭgas por dramprezentado, kaj aŭ mankoj de la akustiko, aŭ mankoj de la voĉproduktado de la trupo, sufiĉe ĝenis la aŭdantaron. Kelkfoje veraj ŝlosilvortoj ne estis aŭdeblaj, kaj tiel oni ne povis perfekte sekvi la evoluon. La okuloj pli ĝuis ol la oreloj pro tri bonaj duon-simbolismaj, duonrealismaj scenaranĝoj, pro kostumoj tre taŭgaj kaj pro la vervaj, signifoplenaj gestoj de la geaktoroj, kiuj ja donis multajn indikojn de artisma seriozeco kaj atenta preparado. Ni konsciis, ke la reĝisorino, Aase Ziegler, tre laboris por perfektigi diversajn detalojn.

„La Vivo estas Bela”, de Leck Fischer, estis la sola serioza drameto, sufiĉe forte kaj sincere ludita, kvankam la akustikaj kaj prononcaj mankoj terure ĝenis la aŭdantaron. Jais Jensen, kiel boksisto, konvinkis nin pri sia psika malekvilibro. Por mi la saĝne signifoplena lasta frazo estis — neaŭdebla.

„Ruĝa kaj Griza” de Soya estis multe pli klare elparolata kaj pli bone aŭdebla. La ĉefrolantoj Jørgen Jensen kaj Anna Riis meritas specialan laŭdon pro la polurita ludado kaj bona voĉproduktado. Kvankam la tikla temo (senedza patrinceco) estis bona ekzemplo al tiuj landoj, en kiuj napkapaj cenzuristoj ankoraŭ tiranas, la elekto estis eble maltaŭga por Kongreso, kiun partoprenas homoj el multaj tre malsimilaj medioj, kaj ĝi ofendis kelkajn. Mi mem ridis, sed bedaŭris pro la malprofundeco, la t.n. „tragikomedio” estis fakte nur farseto.

La lasta teatraĵo, „La Kverelbirdo” estis eĉ pli malprofunda, estante farso iom kruda. Mi dubas ĉu ĝi vere meritis la polurlaboron, kiun la geaktoroj videble dediĉis al ĝi. Ole Høffding, kiel senaplomba bibliotekisto kaj destinita viktimo de ĉiu epizodo, meritas apartan mencion pro la tre zorgita ludado, priatentita en detaloj.

La vespero estis interesa kaj oni devas esti dankema al la multaj personoj, kiuj laboregis por doni plezuron al la kongresanoj. Tamen, mi apenaŭ

povas kredi, ke popolo tiel civilizita kaj klera kiel la dana, ne havas pli altnivelajn modernajn dram-verkojn; la postgusto estis preskaŭ de trivialeco, kaj la dramoj, ne la geaktoroj, kulpis. Mi suspek-tas, ke la problemo estas tiu sama, kiu ekzistas en multaj landoj: bonaj unuaktaj dramoj tre maloftas, eĉ kiam triaktaj bonegaj dramoj estas facile trove-blaj. La celo estis, sendube, prezenti al ni pli da varieco kaj pli da danaj verkistoj; ser ĉar la kul-tura nivelo de la elektita triopo fakte ne estis inda je kultura mondkongreso, eble longa dramo estus estinta pli taŭga.

JUBILEA KUNVENO DE I.S.A.E.

Internacia Scienca Asocio Esperantista okazigis mardon matene en la salono Zamenhof specialan aranĝon por festi la 50-jaran jubileon de sia ekzisto.

Unue la trio **Esther Vagning** (piano), **Erik Thomson** (fluto) kaj **Mogens Steen Andreassen** (hobojo) kun multe da arta gusto ludis la sonaton de Johann Quantz. Poste **Poul Thorsen** deklamis sian Prologon, kiun ni aperigas en tiu ĉi numero de la revuo. La Vicprezidanto de I.S.A.E., Muzea Kuratoro **C. Støp-Bowitz** bonvenigis la mult-nombrajn ĉeestantojn kaj akcentis, ke la scienco, same kiel la muziko, estas universala kaj tial ĝi bezonas komunan lingvon. Li informis, ke I.S.A.E. eldonos, okaze de sia jubileo, verkon de ĉ. 250 grandformataj paĝoj. Ĝia provizora titolo estas „Sciencaj Studoj“, kaj en ĝi promesis kunlabori per originalaj kontribuoj multaj sciencistoj-esperantistoj.

D-ro Paul Neergaard, la ĉefa organizinto de la festo, prezentis la evoluon de I.S.A.E., kiu estis fondita dum la Dua Universala Kongreso de Esperanto en Genevo. Inter la fondintoj estis la fama franca specialisto pri balistiko, generalo **Sébert**. Internacia Scienca Revuo, kiu poste fariĝis organo de la Asocio, komencis aperadi jam du jarojn antaŭ la fondiĝo de I.S.A.E., nome en 1904. Multaj sciencistoj publikigis en ĝi diversajn traktaĵojn, el kiuj unu el la plej gravaj estis tiu de la fama svisa entomologo kaj seksbiologo **August Forel**.

Inter la dek sciencistoj, kiuj ĝis nun estis prezidantoj de I.S.A.E., troviĝas la nomoj de du Nobel-Premiitoj: **D-ro J. J. Thomson**, profesoro pri fiziko en la Universitato de Cambridge, kaj **D-ro Cotton**, profesoro pri fiziko en la Pariza Sorbonne. Post la Dua Mondmilito, dank' al la larĝvida nederlanda eldonejo **Muusses**, la organo de I.S.A.E. denove regule aperas kun enhavo ĝenerale tre altnivela, tiel ke ĉiu klera homo povas ĝin legi kun intelekta profito. La esperantistoj, kiuj komprenas la gravecon de komuna lingvo por la scienco, devus multe pli forte apogi I.S.A.E. per aliĝoj kaj abonoj al ĝia organo.

D-ro Neergaard menciis ankaŭ la gravajn studojn rilate normigon, kiujn faris precipe la fama

aŭstra esperantologo **Eügen Wüster** kaj la rusa terminologo **Ernest Drezen**. En la lasta tempo **D-ro Holmstrom** de UNESKO sugestis proponon pri Esperanto kiel pontolingvo por fakaj terminaroj.

En la kadro de la festo **Prof. D-ro W. E. Collinson**, emerita profesoro de la Universitato de Liverpool, faris prelegon sub la titolo „Lingvoj en Kontakto — La Teorio de Pruntvortoj kaj de Lingvomiksado“. La tre interesa kaj grava prelego de la fama brita lingvisto signifas novan kontribuon al pli bona kompreno de miksiĝoj kaj kunfandiĝoj en la evoluo de la lingvo.



Prof. D-ro W. E. Collinson, emerita profesoro de la Universitato de Liverpool, M.A. de la Universitato de Londono, Dr. Phil. de la Universitato de Heidelberg, Fellow de la „University-College“ en Londono, dum tiu ĉi Kongreso elektita kiel Membro de la Honora Patrona Komitato de U.E.A.

Post mallonga paŭzo **Prof. D-ro Ivo Lapenna** faris mallongan konkludan paroladon pri la „Perspektivoj por la Apliko de Esperanto en la Scienco“. Li difinis la sciancan laboron kiel intelektan aktivecon, kiu celas ekkoni aŭ larĝigi la konojn pri la leĝoj regantaj la naturon kaj la homan socion. Tial la scienco dividiĝas je du grandaj branĉoj: naturaj sciencoj kaj sociaj sciencoj. Aliflanke ne estas scienco la lernado de la jam ekkonitaj leĝoj, nek ilia aplikado en la praktiko aŭ transdonado al la aliaj. Personoj, kiuj okupiĝas pri tio, povas esti tre grandaj fakuloj kaj ilia laboro estas sendube tre utila, sed ili ne povas esti konsiderataj kiel sciencistoj. En I.S.A.E. troviĝas kaj povas esti ĝiaj membroj ĉiuj, kiuj havas ian ajn rilaton al la scienco, do ne nur sciencistoj, sed ankaŭ divers-specaj fakuloj. La plua utiligo de Esperanto por la scienco dependas ne nur de la pretenco de sciencistoj verkadi en la lingvo, sed ankaŭ de la kapablo de la esperantista publiko havigi al si iliajn verkojn. Kun la konstanta pligrandiĝo de la nombro de personoj sciantaj la Internacian Lingvon, samtempe pligrandiĝas la eblecoj por apliko de Esperanto en la scienco. Tio ankaŭ malfermas ĉiam pli la paĝojn de nacilingvaj sciencaj revuoj por studoj kaj artikoloj, verkitaj en Esperanto. **Prof. Lapenna** en la fino forte rekomendis al la esperantistoj subteni I.S.A.E. kaj ankaŭ mendi la verkon *Sciencaj Studoj*.*)

Per ludado de la *Divertimento de la Dana komponisto D. F. Kuhlau* finiĝis tiu ĉi jubilea festo, laŭ la karaktero kaj agordo digna de I.S.A.E. kaj de la Internacia Lingvo.

*) *Oni informis nin, ke tiu alvoko ne restis seneĥa: pli ol 150 personoj jam dum la Kongreso antaŭmendis kaj pagis la verkon. La libro kostos 18 danajn kronojn, aŭ 18 anglajn ŝilingojn aŭ egalvaloron kaj oni povas ĝin mendi ĉe la sekretario de I.S.A.E., Prof. B. Popovic, Zagrebačka 12, Sarajevo, Jugoslavio, kiu donos ĉiujn informojn pri la adresoj al kiu oni sendu la monon.*

Prologo

50-jara Jubileo de Internacia Scienca
Asocio Esperantista
Kopenhago 7-8-1956

Pasis duona jarcento decida —
Staras scienco kaj lingvo planita
ambaŭ ĉe grava instanco:
Ĉu ruiniĝo aŭ renesanco?

Antaŭ defio
vokas racio
ambaŭ nun por alianco.

Luktis scienco en ĉiu epoko
kontraŭ ignoro, malhelpo kaj moko.
Sed Galileo kaj Fulton
pruvigis, ke eblas privenki la stulton.
Al pioniroj
ofte martiroj,
sentu hodiaŭ la ŝuldon.

Preter progresoj kvalitaj kaj kvantaj
pasis scienco per paŝoj gigantaj.
Kreskis la sano kaj aĝo,
krevis la nuboj de kriza domaĝo.

Kun konsekvenco
gvidas scienco
voje al sato kaj saĝo.

Ritmo distingas sin ĝis la krescendo
tra la perturboj de l'nuna jarcento:
Beno kaj bruo teknika,
vivo facila — sed esto komplika.

La teorio
per energio
iĝas realo unika.

Homo racia facile konkludas:
Guste nun lingva problemo akutas!
Tamen al indiferento,
ruido, rutino ĝis nuna momento
lukti necesas,
ĝis ni sukcesas
veli science en vento.

Lingvo tutmonda ekestis pro revo —
Ne nur militoj minacis per krevo.
Premis nin longe kateno:
La izoleco, sed venkis la peno
antaŭ UNESKO.
Venas nun kresko
en pli sekura haveno.

Ĉar Esperanto, helpilo teknika,
montris por arto sin plene efika.
Floris ĝi en la izolo,
fajnas nun kiel matura grapolo.
Tempo obskura
tenis ĝin pura
sub humanisma kontrolo.

Tia kontrolo estas esenca
lingve, sed eĉ pli al vero scienca:
Vero neniam por vendo.
— Sorĉo-disĉiploj de l' nuna momento!
Fortojn vi veku,
sed ankaŭ regu
glore al inteligento!

Poul Thorsen

DU KUNSIDOJ DE LA AKADEMIO

La supera lingva instanco de la Esperanto-Movado kunsidis du fojojn. London posttagmeze kunvenis dekkvino da Akademianoj en nepublika kunsido. Prezidis la Prezidanto de la Akademio Inĝ. J. R. G. Isbrucker. Oni interŝanĝis ideojn rilate kelkajn aktualajn demandojn, precipe koncerne fakajn terminarojn. Poste la Akademianoj preparolis la novajn elektojn por la vakaj lokoj. En kunligo kun tio estis preparolitaj kelkaj paragrafoj de la nuna Statuto. En la diskuto partoprenis ĉiuj Akademianoj kaj fine oni decidis rekomendi ŝanĝon de tiuj paragrafoj, kiuj koncernas la kandidaĵon de novaj membroj. Se la rekomendo estos akceptita de la Akademio, en la estonteco la proponon pri kandidatoj povos fari 5 Akademianoj apartenantaj al minimume 3 nacioj.

La publika kunveno de la Akademio okazis vendredon, la 10-an de aŭgusto je la 15-a horo en la salono Zamenhof. Ankaŭ ĝin prezidis la Prezidanto kaj ĉeestis pluraj Akademianoj kaj multnombra publiko. La temon „Elparolado de Esperanto” enkondukis Ak. Støp-Bowitz. Li trovis, ke la diverseco en la elparolo, kaŭzita de nacilingva influo, konstante malkreskis. Restas ankoraŭ la diverseco de la melodio, sed ĝi ne ĝenas la kompreneblon kaj eĉ donas specialan ĉarmon. Li proponis, ke la Akademio restarigu sian sekcion pri prononcado kun la celo forigi la erarajn instruojn pri la prononco, kiuj troviĝas en multaj lernolibroj.

La peto de s-ro F. Azorin, ke la Akademio nuligu sian deklaron pri la „Ilustrita Vortaro de Esperanto”, ne trovis konsenton de la Akademio.

La lastjaraj publikaj kunvenoj de la Akademio montris, ke por la lingvaj demandoj ekzistas granda interesiĝo. Tial estas utile, ke la Akademio daŭrigu okazigi dum la U.K. tiajn publikajn kunvenojn. Ju pli bone preparitaj ili estos, des pli grandan utilon ili donos kaj des pli altiĝos la prestiĝo de la Akademio.

DUMKONGRESAJ LABOROJ DE U.E.A.

La laboroj de UEA okazis en du ĝeneralaj kunvenoj, en tri sekcioj traktantaj la kongresajn temojn kaj en kunsidoj de la Estraro kaj Komitato dum la tuta semajno.

LA ĜENERALAJ KUNVENOJ

La unua ĝenerala kunveno okazis lundon sub prezido de S-ro E. Malmgren, prezidanto de UEA. Jam pli frue aŭdiĝis la famo ke frue en la mateno estis alveninta la hungara delegacio kaj kiel unua parolanto suriris la estradon dum grandega aplaŭdo Julio Baghy, post multaj jaroj denove alveninta al kongreso. Li salutis en sia propra nomo kaj emfazis precipe pri paca kunlaborado. La ŝtata reprezentanto de Hungarlando, S-ro Domokos, transdonis la oficialajn salutojn de sia registaro. S-ro Petit, ĵus vizitinta Sovetunio, alportis salutojn de la esperantistoj en Moskvo kaj Leningrad, kiuj estas rekonstruantaj sian enlandan movadon. Sekvis laŭtleĝado de nombro da saluttelegramoj kaj leteroj, i.a. de la tri honoraj prezidantoj Ĝeneralo Bastien, Prof. Privat kaj S-ro Kürsteiner. Respondaj telegramoj estas senditaj al ili.

La prezidanto memorigis, ke mortis en la lasta jaro D-ro Maruzzi, D-ro Kamaryt, S-ro Bugajski kaj Sino Schoofs. La kunveno honorigis ilin per kelkaj minutoj de silento.

Sekvis salutoj de pluraj esperantistaj instancoj, gazetoj kaj fakaj kaj neneŭtralaj organizaĵoj. La prezidanto esprimis koran gratulon al S-ro I. Dratwer, ĝen. sekr. de Asocio de Esperantistoj en Pollando, kiu ricevis de la Statkonsilantaro ordenon de Ora Kruco de merito pro siaj meritoj por la Esperanto-movado.

La kunveno traktis la Estraran Raporton, kiun ĉiu kongresano ricevis en presita formo inter siaj kongresaj dokumentoj. La ĝen. sekr., Prof. Lapenna, aldonis plurajn klarigojn pri la diversaj ĉapitroj, pluraj membroj faris demandojn kaj

sugestojn kaj la ĉeestantoj montris sin kontentaj pri la multaj faritaj laboroj. Prof. Lapenna faris alvokon al tiuj kongresanoj, kiuj ne estas membroj de UEA, aliĝi al la Asocio, kies kongreson ili ĝuas kaj kies laborojn ili aprobas. En la halo de la kongreso funkcias budo, kie oni volonte enskribas novajn membrojn.

En aldono al la presita estrara raporto troviĝas la jaraj raportoj de la landaj asocioj kaj de pluraj fakaj kaj neneŭtralaj asocioj, el kiuj pruviĝas, ke ankaŭ en tiuj medioj oni ĝenerale multe laboras kaj bone progresas.

La dua ĝenerala kunveno okazis vendredon sub prezido de S-ro D. Kennedy, vic-prezidanto de UEA. La prezidantoj de la tri kongresaj sekcioj, S-ro D. Kennedy, Prof. I. Lapenna kaj S-ro G. C. Figuera raportis pri la laboroj kaj konkludoj de la sekcioj. Plue, raportis al la kunveno pri siaj dumkongresaj laboroj pluraj fakaj asocioj. I.a. raportis por Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj F.ino J. Dedieu; por Internacia Scienca Asocio Esperantista Prof. B. Popoviĉ; por Tutmonda Esperantista Ĵurnalista Asocio S-ro Jespen; por la Pacmovado S-ro P. Balkanyi; por la Studenta Esperanto-Movado S-ro P. Skårup; pri la Infankongreseto raportis S.ino Karen Bjørnsby.

En la fino de la kunsido S-ro Thollet apelaciis al la esperantistoj kiom eble plej multe oferi por Esperanto kaj F.ino Vermaas, Administranto de UEA, donis kelkajn informojn pri la Jarlibro kaj la Revuo de UEA.

LABOROJ DE LA SEKCIOJ

La temo de la unua sekcio estis: „**Esperanto en la Edukado**”. La sekcio havis du kunsidojn. La prezidanto de la sekcio, S-ro Kennedy, raportis pri tri enketoj koncerne instruadon, kiujn faris UEA: a. pri la nombro de instruistoj, kiuj pretas instrui Esperanton, se ĝi estus ĝenerale enkondukita. Venis respondoj de 457 geinstruistoj en 35 landoj; b. pri la nuna instruado de Esperanto: en 147 lernejoj en 23 landoj nuntempe Esperanto estas instruata al 4000—5000 lernantoj; c. pri la influo de Esperanto-instruado al aliaj lernejoj objektoj. La lasta enketo ankoraŭ ne estas finita, sed el envenintaj respondoj oni povas konkludi, ke antaŭa lernado de Esperanto helpas precipe al lernado de geografio kaj al lernado de aliaj fremdaj lingvoj.

La sekcio diskutis la proponon pri enkonduko en kelkajn lernejojn de Esperanto kiel baza instruado por plia lingvoinstruado. S-ro Malmgren, prezidanto de UEA, parolis pri plano de UEA, koniĝita al la landaj asocioj pere de speciala cirkulero. Profesiaj instruistoj provu akiri la permeson de siaj aŭtoritatoj uzi Esperanton kiel instruilon por la ĝenerala gramatiko de aliaj lingvoj. Temas do pri pedagogia afero, ne pri Esperantopropagando.

Sajnas ke en Svedujo kaj Aŭstrujo ekzistas eblecoj por fari tian eksperimenton.

La sekcio diskutis la demandon de internacia ekzamena komisiono, pri kio jam estis decidite en Bologna, sed kio ĝis nun ne estas efektivigita. Precipe S.ino Emilija Lapenna kaj S-ro Elliott akcentis, ke bezonata estas komisiono, kiu konsistu ekskluzive el universitato edukitaj personoj kun nepre funda lingvokono, por ke tiu komisiono povu doni atestojn al personoj kiuj en diversaj landoj instruos Esperanton. La atesto de tiu komisiono estu dokumento al kiuj la ŝtataj aŭtoritatoj povos fidi. La sekcio esprimis la nepran deziron ke en la kongreso de Marseille UEA funkciigu tian ekzamenkomisionon.

La sekcio diskutis ankaŭ la problemon atingi la bonvolon de la gepatroj por Esperanto-instruado al la infanoj kaj S-ro Franc Moravec raportis pri la edukado de infanoj dekomence ankaŭ en Esperanto, kio nuntempe estas farata en ĉ 100 familioj.

La temo de la dua sekcio estis: „**La Lingva Problemo kaj la Internaciaj Organizaĵoj**”. La sekcio havis unu kunsidon sub prezido de Prof. D-ro Ivo Lapenna, ĝen. sekr. de UEA, kiu enkonduke diris, ke la celo de la sekcio ne estas fari iajn decidojn, sed doni klaran bildon pri la nuna situacio en internaciaj organizaĵoj kaj interŝanĝi spertojn kaj opiniojn. Prof. Lapenna donis superrigardon pri la evoluo de la lingvoproblemo, kiu fariĝis ĉiam pli kaj pli komplikita. En la tempo de la unua mondmilito la interŝtata lingvo estis ĉefe la franca, dum nun Unuiĝintaj Nacioj havas 5 kaj UNESKO eĉ 8 oficialajn lingvojn. La manko de komuna lingvo malhelpas gravajn personajn kontaktojn en registaraj kaj neregistaraj internaciaj organizaĵoj kaj — aliflanke — ĝi limigas la delegaciojn al personoj, kiuj antaŭ ĉio disponas pri sufiĉa lingvoscio kaj tiuj ne ĉiam estas ankaŭ la personoj, kiuj el faka vidpunkto estas la plej kompetentaj. Por malpliigi la malfacilaĵojn oni enkondukis novan kategorion de lingvoj apud la oficialaj, nome la laborlingvoj. Tamen ankaŭ ilia nombro kreskas pro kialoj de prestiĝo. UNESKO havas nun 4 laborlingvojn. D-ro Lapenna, kiu mem ĉeestis multajn internaciajn konferencojn, donis ekzemplojn pri la nebla situacio kaj pri la malkontentiga funkciado de traduksistemoj, precipe dum diskutoj. Ankaŭ aliaj venis al sama konkludo kaj tial la nederlanda urbo Arnhem kunvokis konferencon por studi la problemon. Raporto pri tiu konferenco, kiun partoprenis ankaŭ elstaraj esperantistoj, aperis en la revuo „Esperanto”. La konkludo de tiu konferenco estis, ke unu komuna lingvo estas nepre bezonata. Ĝi daŭrigos la laborojn.

En la diskuto pluraj ĉeestantoj raportis pri siaj spertoj kaj sugestis enpenetradon de esperantistoj en ĉiuspecajn internaciajn mediojn.

La temo de la tria sekcio estis „**Esperanto kaj la Junularo**” kun du branĉoj: a. „Organizaj formoj

de la junulara movado" kaj b. „Disvastigo de Esperanto inter la junularo". La sekcio havis du kunsidojn. Prezidis S-ro G. C. Fighiera. La laboroj de tiu ĉi sekcio jam estis antaŭpreparitaj dum la 12-a Junular-kunveno en Büsum, okazinta ĝuste antaŭ la kongreso. Oficiala delegacio de tiu kunveno faris raporton, kiu estis larĝe diskutata en la sekcio kaj kiu kondukis al rezolucio, kies ĉefa enhavo estas, ke estos fondita Internacia Junulara Asocio, en kiu kunfandiĝos TEJO kaj kies membroj povos fariĝi individuaj membroj de UEA je rabatita kotizo. La detaloj estos kiel eble plej baldaŭ traktataj kun UEA. Por efektiviĝi la proponojn kaj fiksi la regularon estis elektita komitato konsistanta el Günther Becker, Paul Ciliga, Gian Carlo Fighiera, Nicola Minnaja, Heinrich Reiter, Richard Reuchlin, Ben van Moorst.

Pri la disvastigo de Esperanto inter la junularo Nicola Minnaja faris proponon de rezolucio, kiu estis detale pridiskutata kaj fine unuanime akceptita. Diskutataj estis plue la eblecoj enpenetri en neesperantistajn junularorganizojn. Koncerne tion la sekcio akceptis jenan rezolucion:

„La Tria Sekcio „Esperanto kaj la Junularo" de la 41-a Universala Kongreso de Esperanto

konstatas, ke en la hodiaŭa vivo la junularo ludas ĉiam pli gravan rolon por akceli la interpopolan solidarecon kaj amikecon, ke la plena efektiviĝo de tiu rolo postulas aktivan internacian kunagadon de la junularo en ĉiuj aferoj de la socio, ke la lingva problemo ĝis nun grave malhelpis la klopodojn tiuelajn:

atentigas, ke Esperanto prezentas la solan racian kaj praktikan solvon de la lingvaj malfacilaĵoj, kiel pruvas ĝia vasta uzado en ĉiuj kampoj de la internaciaj rilatoj, interalie en fakaj tutmondaj kongresoj kaj konferencoj kaj en multaj internaciaj junularkunvenoj,

invitas ĉiujn internaciajn junular-organizojn kaj ĉiujn junulojn en la mondo utiligati la servojn de la Internacia Lingvo por Edukado, Scienco kaj Kulturo, kiujn agnoskas la rezolucio de la Ĝenerala Konferenco de UNESKO en Montevideo".

(La esperantistoj estas petataj traduki la supran rezolucion en sian nacian lingvon kaj disvastigi ĝin pere de la neesperantista gazetaro.)

Pri la metodoj por esperantlingva edukado de infanoj S-ro Moravec donis informojn, dum S.ino Minnaja donis konsilojn kaj precizigojn pri la metodo en kiu estu atentata la necesa dulingvismo nacilingva-esperanta. Pri tiu ĉi temo la sekcio akceptis jenan rezolucion:

„La Tria Sekcio „Esperanto kaj la Junularo" de la 41-a Universala Kongreso de Esperanto

konstatas, ke en multaj esperantistaj familioj oni jam uzas Esperanton kun infanoj ek de ilia naskiĝo, rekomendas al ĉiuj Esperantistaj gepatroj nepre sekvi tiun ekzemplon, substrekas la gravecon internacie organizati tiujn infanojn utiligante la jam akiritajn spertojn".

KOMITATO DE UEA — DECIDOJ

La Komitato laboris en kvin komisionoj: 1. Preparo de la elektoj; 2. Ĝeneralaj aferoj, Kongresoj, Landaj kaj Fakaj Asocioj, Kulturaj problemoj;

3. Administrado, Financoj, Jarlibro, Revuo; 4. Eksteraj Rilatoj, Informado, CED; 5. Statuto kaj regularoj. Ĉiuj komisionoj raportis pri siaj laboroj al la plena Komitato, kiu surbaze de tio faris siajn decidojn.

La Komitato akceptis plurajn ŝanĝojn en Statuto kaj Regularoj, kiuj estas ne esencaj, sed necesaj por adaptiĝi al la cirkonstancoj en Nederlando kaj i.a. por akiri la juran personecon por la Asocio.

Tiuj decidoj de la Komitato, kiuj koncernas ŝanĝon de Statuto ekvalidos nur post ilia akcepto per ĝenerala voĉdonado laŭ ĉap. XIV de la Statuto.

La Komitatoj A kaj B alektis kiel komitatojn C la jenajn personojn: S-ro E. Dahl, S-ro S. Dragsted, D-ro W. Herrmann, S-ro H. Holmes, S-ro H. Jakob, S-ro R. Llech-Walter, S-ro T. Sekelj.

Ĉeestis la kongreson 35 komitatoj aŭ anstataŭantoj, el kiuj la grandega plimulto regule ĉeestis la kunsidojn.

La Komitato akceptis la Bazan Laborprogramon de UEA por la sekvantaj jaroj. Ĝi estos presita en la Jarlibro II 1956.

La Komitato diskutis la Estraran Raporton, kiu estis en presita formo aldonita al la kongresaj dokumentoj kaj unuanime akceptis ĝin. En la nomo de la komitatoj Kap. Bugge-Paulsen esprimis dankon pro la ampleksaj kaj gravaj laboroj faritaj de la Estraro.

La Komitato akceptis Japanan Esperanto-Instituton kaj Bulgaran Esperantistan Asocion kiel aliĝintajn landajn asociojn kaj ĝi rajtigis la Estraron akcepti ankaŭ Hungarlandan Esperantistan Konsilantaron kaj Izraelan Esperanto-Ligon, se evidentiĝos, ke ankaŭ tiuj organizaĵoj, kiuj jam sendis aliĝpeton al la Estraro, plenumas la kondiĉojn fiksatajn en la Statuto.

La Komitato decidis, ke landaj asocioj en malgrandaj landoj povos aliĝi al UEA, se ilia membronombro estas malpli ol 150 kaj pli ol 25. Ili rajtos sendi observanton al la komitatkunsidoj, sed ili ne rajtos havi komitatanon. Fakaj Asocioj neŭtralaj povos aliĝi al UEA pagante fiksitan jaran kotizon senkonsidere al la membronombro.

La Komitato esprimis sian ĝojon pro la starigo de junulara sekcio kaj decidis, ke la membroj de tiu sekcio, malpli ol 21-jaraj pagos la duonon de la membrokotizoj MJ kaj MA de UEA.

La Komitato elektis kiel reprezentantojn de UEA ĉe la kunsido de la Kultura Komisiono de la Eŭropa Konsilantaro en septembro en Oslo Kap. R. Bugge-Paulsen kaj S-ron C. Støp-Bowitz.

La Komitato fiksas kiel definitivajn datojn por la 42-a Universala Kongreso en 1957 en Marseille la 3-an ĝis la 10-a de aŭgusto kaj esprimas bedaŭron ke pro miskomprenoj pli frue estis publikigitaj aliaj datoj.

La malnova Komitato eksigis jam antaŭ la kongreso per 22 voĉoj kontraŭ 6 kaj 5 sindetenoj S-ro G. A. Connor, ĝeneralan sekretarion de EANA kaj komitatanon, pro liaj publikigaĵoj en Amerika Esperantisto kaj pamfletoj, per kiuj li agis kontraŭ art. 3 kaj 4 de la Statuto de UEA. Evidentiĝis, ke pluraj el tiuj, kiuj voĉdonis kontraŭ aŭ sin detenis, faris tion ne ĉar ili aprobis la agadon de S-ro Connor, sed ĉar ili opiniis, ke la proceduro de la eksigo ne estis tute korekta. En la nova komitato la afero estis rediskutita, trastudita kaj klarigita, post kio la nova Komitato konfirmis la decidon de la malnova komitato per jena rezolucio proponita de S-ro Petit:

1. Ĉar la Estraro estas elektita de la Komitato kaj respondeca al ĝi, la Estraro ne povas eksigi el la Asocio iun komitatanon. Tial la Estraro prave transdonis la aferon al la Komitato kiel supera organo de UEA;
2. Studinte la aktojn pri la eksigo la Komitato decidis konforme al la Statuto. En la proceduro sekve ne estis ia manko;
3. Laŭ la Statuto la decido de la Komitato estas definitiva;
4. La Komitato malakceptas la proponon de D-ro Solzbacher nuligi la decidon, sed konfirmas la eksigon per 24 voĉoj kontraŭ 2 kaj 2 sindetenoj. (La Estraro ne voĉdonis.)

En kunligo kun tiu ĉi afero la Komitato akceptis per 26 voĉoj kaj du sindetenoj (la Estraro ne voĉdonis) la jenan rezolucion proponitan de S-ro Dahl:

„La Komitato

konstatas, ke la Estraro de UEA en sia laboro por Esperanto kaj por la Asocio rigore observis la principon de absoluta neŭtraleco rilate al nacieco, raso, religio, politiko kaj sociaj problemoj;

deklaras sian indignon pro la atakoj, insultoj, misprezentoj, kalumnioj kaj fiaj karikaturoj aperintaj en Amerika Esperantisto rilate UEA, ĝiajn gvidajn instancojn kaj speciale ĝian ĝeneralan sekretarion, al kiu la Komitato esprimas siajn simpatian kaj solidarecon.”

Dum la kongreso alvenis nova numero de Amerika Esperantisto enhavanta raporton pri la ĉijara kongreso de EANA en Detroit kaj rezolucion akceptitan de tiu kongreso. Per tiu rezolucio la kongreso esprimis plenan fidon al S-ro Connor,

laŭdis lian agadon kaj kuraĝigis lin daŭrigi. La rezolucio signifas plenan solidarecesprimon rilate S-ro Connor. La numero enhavas ankaŭ foton de la kongreso — kiun evidente partoprenis malpli ol 50 personoj — en kies mezo estas videbla D-ro Solzbacher, kiu ĵus deklaris en la Komitato ke li ne konas la sintenon de EANA rilate la agadon de S-ro Connor kontraŭ UEA kaj ĝiaj funkciuloj — kvankam li oficiale reprezentas EANA en la Komitato — ĉar li ne plu estas en ĝia estraro.

Surbaze de ĉio ĉi la Komitato opiniis, ke ne plu ekzistas alia elirvojo ol eksigi EANA el UEA. Ĝi akceptis proponon faritan de S-roj Setälä kaj Stöp-Bowitz eksigi EANA laŭ la proceduro antaŭvidita en art. 27 de la Generala Regularo, per 26 voĉoj kontraŭ unu kaj unu sindeteno. La Komitato esprimis sian bedaŭron esti devigita fari tiun decidon, ĉar ĝi estas konvinkita, ke el la 600 membroj de EANA nur tre malmultaj efektive aprobas la agadon kaj publikigaĵojn de S-ro Connor.

La Komitato decidis starigi Honoran Patronan Komitaton, en kiu estos elektitaj nur elstaraj sciencistoj, unue lingvistoj de alta internacia reputacio.

La Komitato elektis en la Honora Patrona Komitato Prof. D-ron W. E. Collinson, emerita profesoro de la Universitato de Liverpool, M. A. Universitato de Londono, Dr. phil. ĉe la Universitato de Heidelberg, „Fellow” de „University College”, London, membro de la Akademio de Esperanto.

La Komitato deklaris, ke estas dezirinde ke en proksima tempo la biblioteko de UEA estos transportita al Nederlando, kie ĝi estos aranĝita kaj utiligebla.

La Komitato decidis sendi la materialon de la Universala Ekspozicio al la Oficejo, kie ĝi estos kompletigita.

La Komitato fiksas por 1957 la kotizon por MJ je duono de la kotizo por MA. La kotizo por Patrono estos dekoblo de la MA-kotizo. Ĉiuj aliaj kotizoj restos neŝanĝitaj.

La Komitato elektis novan Estraron. Evident-



S-ro Harry Holmes
O.B.E.,
Londono, vic-Prezidanto
de U.E.A.



S-ro P. M. Mabesoone,
Amsterdam, Vic-
Prezidanto de U.E.A.



S-ro R. Lech-Walter,
Perpignan, Estrarano
pri Kongresoj.



D-ro Ing. Giordano Azzi,
Como, Estrarano pri
Kulturaj Aĵeroj.



D-ro W. Herrmann,
Lampertheim,
Estrarano pri Landaj
kaj Fakaj Asocioj.



41-a
UNIVERSALA KONGRESO
DE ESPERANTO
KOPENHAGO-DANLANDO
1. aŭgusto - 11. aŭgusto 1956

La kongresanaro de la 41-a Universala Kongreso de Esperanto, okazinta de la 4-a

iĝis necese por disdivido de la ampleksaj taskoj altigi la nombron de estraranoj de kvin ĝis sep. La nova Estraro konsistas el la jenaj personoj:

- Prof. D-ro G. Canuto, prezidanto;
- S-ro P. M. Mabesoone, vic-prezidanto kaj estrarano pri financoj;
- S-ro H. Holmes O.B.E., vic-prezidanto;
- Prof. D-ro I. Lapenna, ĝenerala sekretario;
- S-ro R. Llech-Walter, estrarano pri kongresoj;
- D-ro G. Azzi, estrarano pri kulturaj aferoj;
- D-ro W. Herrmann, estrarano pri landaj kaj fakaj asocioj.

KUNVENOJ DE FAKAJ KAJ NENEŬTRALAJ ORGANIZAJOJ

En la kadro de la kongreso laboris la jenaj organizaĵoj:

Internacia Scienca Asocio Esperantista havis krom sia jubilea festo ankaŭ sian jarkunvenon dum la kongreso. Ĝi diskutis multajn internajn aferojn, i.a. aliĝon al UEA, membrigon de studentoj, eldonon de fakaj libroj, terminaroj ktp. kaj traktis la nunan situation koncerne Sciencan Revuon. La kunveno akceptis rezolucion, kiu tekstas jene:

La kunveno:

- konstatas** ke, lau la enketo publikigita en „Scienca Revuo” jam ne ignorebla nombro de fakaj revuoj pretas akcepti internacilingvajn artikolojn;
- konstatas** aliparte ke multaj sciencistoj-esperantistoj ne utiligis ĉi tiujn eblojn, publikigante la rezultojn de sia scienca laboro preskaŭ ĉiam en naciaj lingvoj;
- instigas** la esperantistajn sciencistojn nepre aliĝi al ISAE kaj publikigadi siajn fakajn verkojn en la internacia lingvo;
- apelacias** al aliaj esperantistoj helpi la plivastiĝantan penetron de esperanto en sciencaj rondoj per abonado de la Scienca Revuo, per aĉetado de la aperintaj prelegoj de ISU, per antaŭmendoj de „Sciencaj studoj” kaj per donacoj al la fondaĵo „Scienca”.

Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj havis estrarkunsidon kaj du publikajn kunvenojn. La unua kunveno aŭdis la jarraporton, kiu aperis en la aldono al la Estrara Raporto. La kunveno akceptis rezolucion direktitan al la Konsilantaro de Eŭropo, en kiu ĝi esprimas sian ŝaton kaj subtenon koncerne la nun traktatan proponon de 14 reprezentantoj. En la dua kunsido la asocio traktis la temon „La organizo kaj valoro por lernejoj de ferioj en aliaj landoj”, enkondukitan de F.ino Dedieu, kiu raportis pri faritaj interŝanĝoj kun infanoj el la distriktoj Gironde en Francujo kaj Bristol en Britujo. Plue, oni diskutis la aranĝon de infankunveno en Grésillon.

Studentoj. Laŭ iniciato de Studenta Esperanto-Klubo Kopenhago kunvenis dum la kongreso ĉ 40 studentoj por trakti la temon „Organizaj problemoj de la studenta Esperanto-movado”. Surbaze de supozita efektivigo de la intencoj, ke ISAE aliĝu al UEA kaj ke estos fondita junulara sekcio de UEA, la kunveno decidis fondi novan studentan organizaĵon laŭ jenaj principoj proponitaj de Nicola Minnaja:

1. Studenta Esperantista Ligo — kiel oni decidis nomi la organizaĵon — estu sekcio de ISAE, kaj ĝiaj membroj ricevu Sciencan Revuon;
2. ĝi serĉu kontakton kun la fondota junula sekcio de UEA.

La kunveno elektis komitaton, kiu dum la kongreso traktu kun ISAE kaj UEA kaj poste raportos al la studentoj.

Tutmonda Esperantista Jurnalista Asocio, kiu dum tri jaroj ne funkciis, estis restarigita. Oni elektis kiel prezidanton D-ron F. Szilagyi, Sve-



4-a ĝis la 11-a de aŭgusto 1956 en Kopenhago, antaŭ la belega moderna Koncertejo en Tivoli

dujo, vic-prezidanton S-ron Niilo Kavenius, Finnlando, sekretarion S-ron G. Nørgaard Jespen, Danlando, kasiston S-ron A. Ribot, Francujo, vic-sekr. S.inon Vogel, Germanujo kaj kiel ceterajn estraranojn D-ron A. Mildwurf, Britujo, S-ron D. Matjo, Jugoslavio. Provizore Norda Prismo estos la organo de la Asocio. Ĝi povos disponi pri unu paĝo en tri numeroj dum la jaro.

Socialdemokrata Esperanto-Grupo havis kunvenon, kiun ĉeestis 600 personoj. Parolis anstataŭ ministro Ernst Christiansen, kiu ne povis veni pro grava kunsido, la ĉefo de la gazetara servo de la ministerio pri eksterlandaj aferoj, S-ro Sigvald Kristensen. Li salutis en la nomo de la ministro, kiu bedaŭris ne povi partopreni la kunvenon, internacie pensantan kaj el esperantista kaj el socialdemokrata vidpunkto. La ministro intencis akcenti la gravecon de venko de la lingvaj malfacilaĵoj en internaciaj kunvenoj ankaŭ de socialdemokratoj. La parolanto mem spertis tiujn malfacilaĵojn. Li akcentis la neceson de pli granda kompreno kaj de ekonomia justeco kaj li deziris sukceson al la laboroj de la kongreso.

La prezidanto de Dana Laborista Esperantista Asocio, Holger Hansen, skizis la historion de la dana socialdemokratio kaj fine oni montris filmon „La Estonto de la Popolo”, kiu donis bonan impreson pri kelkaj sociaj progresoj en tiu ĉi jarcento en Danlando.

Kristana Esperantista Ligo Internacia havis unu publikan kunvenon por esperantistoj kaj unu por neesperantistoj. En la unua parolis S-roj H. de Hoog kaj D. de Boer, ambaŭ el Nederlando. La kunvenon por neesperantistoj enkondukis kornmuziko de la Savarmeo. Vigle prelegis D-ro Paul

Neergaard pri la Signifo de Esperanto. En la sama kunveno parolis ankaŭ pastroj Poul Jørgensen kaj Ags. Grenov, same kiel S-roj de Hoog kaj Vasiljef.

Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista havis kunvenon kiun gvidis pastro Thalmaier, kiu donis superrigardon pri la pasinta jaro. Pri la ĵus okazinta IKUE-kongreso en Zaragoza ankoraŭ ne envenis raporto. Diskutataj estis la okazinta Eŭkarista kongreso en Rio de Janeiro kaj la sama, okazonta en München en 1960.

Internacia Federacio de Esperantistaj Fervojistoj havis kunvenon, kiu aŭdis raporton pri la ĵus okazinta internacia IFEF-kongreso en Stockholm, kiun partoprenis 350 personoj.

Societo por Internacia Lingvo havis kunsidon en kiu ĝi donis klarigojn pri sia labormaniero, kiu troviĝas nur sur kampo de scienca esplorado.

Internacia Geografia Asocio, kvankam eldonanta belegan revuon, el organiza vidpunkto evidente estas ankoraŭ iom manka, ĉar en la planita kunsido aperis neniu estrarano, tiel ke iu ĉeestanta membro decidis prezidi kaj gvidi la diskutojn.

Internacia Komisiono „Esperanto kaj Sociologio” havis kunvenon, kiu aŭdis la jarraporton, kiu mencias multflankan laboron. La Komisiono nun preparas kunlaboron en la Tria Mondkongreso de Sociologoj okazonta en Amsterdam. La kunveno diskutis vizitojn al sociologiaj institutoj dum kongresoj kaj la formadon de studrondo pri la temo „Maljunulo kaj Socio”.

Proprajn kunsidojn havis krome: Eŭropa Turismo, Odd-Fellow-anoj, Framasonoj, Militkontraŭuloj, Mondpaca Movado, Spiritistoj, Poŝtmarkkolektantoj.

DISERVOJ

Protestanta diservo okazis dimanĉon la 5-an de aŭgusto en la Katedralo de Nia Sinjorino en Kopenhago. Predikis en Esperanto pastro Poul Jørgensen laŭ teksto Joh. 3, 16—21, pri la amo de Dio al la homaro. La preĝejo estis plena. La ĉeestantoj kantis danajn kantikojn tradukitajn en Esperanton.

Katolika diservo okazis en la preĝejo Sankta Ansvar, kie la Episkopo, D-ro Theodor Suhr, celebris la Sanktan Meson. Predikis en Esperanto kaplano Ludvig Thalmaier el München. Plenigis la preĝejon ĉ 300 personoj.

LA UNIVERSALA EKSPozICIO

Sub lerta gvidado de S-ro Eskil Svane la Kopenhaganoj sukcesis per propraj fortoj kaj minimumaj kostoj elmontri la ampleksan materialon de la Montevidea ekspozicio. En tre taŭga ekspoziciejo proksime al la kongresejo ĝi estis praktike ordigita kaj kun arta gusto aranĝita. Grandan laŭdon meritas ĉiuj kunlaborintoj. Ankoraŭ la materialo ne estas sufiĉe kompleta, sed ĝi donas tamen bonegan superrigardon pri ĉio kio estas atingita. La grafikaĵoj kaj aliaj desegnaĵoj, nove faritaj por Kopenhago, estis lerte kaj kelkfoje sprite faritaj kaj vivigis la tuton. Espereble ĉiuj kongresanoj vizitis la ekspozicion, unue, por pli detale ekkoni sian propran aferon kaj, due, por helpi eviti, ke deficiito estos la rekompenco de tiu ĉi meritplena laboro.

Tre taktike estis, aranĝi en la ekspoziciejo la grandan gazetaran konferencon vendredon antaŭ la kongreso, kiun ĉeestis reprezentantoj de ĉiuj gravaj danaj gazetoj. Post la konferenco la ĵurnalistoj trarigardis la tutan ekspozicion kaj ricevis multajn utilajn informojn.

LA UNUA INTERNACIA INFANA KONGRESETO

Dum la kongreso, sed je propra respondeco, okazis tiu ĉi kongreseto en la Ludoĉambro sub gvidado de S-ino Karen Bjørnsby. Ankaŭ pli frue jam okazis kunvenoj de infanoj dum kongresoj, sed ĉi tie la unuan fojon tio estis aranĝita en formo de vera kongreseto. Partoprenis 35 infanoj el 10 landoj, inter 6 kaj 13 jaroj. Ĉiuj parolis Esperanton, kvankam kelkaj nur ĵus eklernis la lingvon. La infanoj estis okupataj dum la tuta semajno, tiel ke la gepatroj povis trankvile partopreni la kongreson. Dum la jaro, pluraj infanoj jam korespondis inter si.

La tuta eksperimento bone sukcesis. Merkredon la infanoj vizitis la kongresejon kaj prezentis sin per kantoj kaj teatraĵetoj. Vendredon la gepatroj kaj edukistoj estis invitataj al la Ludoĉambro. En la programo de la kongreseto troviĝis promenadoj, ludoj, ekskursoj, filmoj, popoldancoj kaj eĉ vespera vizito al Tivoli. Al ni ŝajnas, ke por tiel junaj infanoj la tagoj estis iom longaj kaj lacigaj, sed

certe ĉiuj bone amuziĝis, akiris amiketojn en multaj landoj kaj iris hejmen kun belaj rememoroj eble por la tuta vivo.

ALIAJ GRAVAJ EVENTOJ

OFICIALA AKCEPTO EN LA URBDOMO

La vic-prezidanto de la urba konsilantaro, D-ro Carl Clemmesen, akceptis 500 kongresanojn en la belega urbdomo de Kopenhago kaj alparolis ilin en la granda halo. La prezidanto de UEA, S-ro Ernfrid Malmgren, respondis kaj esprimis koran dankon al la gastama kaj bela urbo, prave nomita la Parizo de la nordo.

En la nomo de oficiala delegacio de la antaŭa kongresurbo Bologna, D-ro Belletini transdonis al la urba konsilantaro de Kopenhago personan leteron de la urbestro de Bologna kaj donacis al la dana ĉefurbo belan kopion de la fama statuo de Neptuno en Bologna. Al tiu ĉi eleganta gesto la dana magistrato respondis per ŝerca paroladeto, post kio li invitis ĉiujn ĉeestantojn al belege aranĝitaj bongustajoj kaj al promeno tra la tuta konstruaĵo.

26-a INTERNACIA KONGRESO DE BLINDAJ ESPERANTISTOJ

En la kadro de la Universala Kongreso la blinduloj havis sian apartan kongreson. Parte ili havis sian propran programon, parte ili ĉeestis ankaŭ la ĝeneralajn kongresajn aranĝojn. Partoprenis pli ol 100 blindaj esperantistoj el 13 landoj. Ili havis ŝakturniron, vizitis fabrikojn kaj institutojn por blinduloj kaj oni demonstraciis al ili la „parolantan libron”, danan inventon laŭ la magnetofona sistemo.

GAZETARA SERVO

Gravega ero de la kongreso estas la Gazetara Servo, en kelkaj jaroj evoluinta ĝis vera perfekteco. Pluraj fakuloj, vidintaj multajn internaciajn kongresojn, opinias ke la Gazetara Servo de la Universalaj Esperanto-Kongresoj estas la plej bone funkcia el ĉiuj. Ĉijare ĝi estis gvidata de S-ro O. C. Lange (nacia subfako), S-ro Povl Skårup (esperanta subfako), S-ro G. C. Fighiera (internacia, neesperanta subfako).

En la mezo de la ronda kongreseja halo troviĝis granda tabulo, sur kiu ĉiutage estis alfiksitaj novaj eltondaĵoj, tiel ke la kongresanoj povis regule konstati la kreskantan nombron da artikoloj publikigitaj pri la kongreso. Sed eble, malmultaj konsciis pri la grandega laboro kiu troviĝis malantaŭ tiuj eltondaĵoj.

Aperis 18 danlingvaj bultenoj senditaj al 352 gazetoj, radiostacioj, novajagentejoj. La esperantlingvaj bultenoj aperis en 6 numeroj plus 4 aldonoj en 300 ekzempleroj. Komunikoj por la eksterlanda gazetaro estis senditaj en pluraj lingvoj, i.a. en itala, germana, kaj sveda.

Grandan laŭdon kaj dankon meritas la gvidantoj kaj ĉiuj kunlaborantoj de la Gazetara Servo.

kiuj tage, sed grandparte ankaŭ nokte laboregis, por ke la kongreso ne restu interna esperantista afero, sed estu larĝe diskonigata en la mondon.

LA AMUZAĴOJ

Kiel kutime, ankaŭ ili ne mankis en la kongreso. La Interkona Vespero, kiel ĉiam, havis gajan agordon pro ĉie ĉirkaŭe okazantaj ĝojaj revidiĝoj. La salonegoj de Odd-Fellow-palaco havis la avantaĝon ke ili estas tiel vastaj, ke sufiĉe facile povis movi sin la centoj da kongresanoj. En la sama konstruaĵo okazis ankaŭ la Kongresa Balo, bone aranĝita, ĝenerale bele kaj elegante aspektanta. En pluraj postmilitaj kongresoj okazis, ke en la balo subite aperis multaj junuloj, vigle parolantaj nacilingve kaj neniam vidataj dum la cetera kongresa semajno. Ne tiel en Kopenhago, kie vidiĝis granda nombro da gejunuloj bone dancantaj, bone parolantaj Esperanton kaj vigle partoprenantaj la tutan kongreson.

En la tago de la ekskursoj okazis ŝipekskurso al Hålsingborg, kun akcepto ĉe la urbestro, aŭtobusekskurso al Norda Selando kaj alia al Suda Selando kaj Møen. Estis bona vetero kaj ĉiuj ĝuis la belecon de la gastiganta lando.

Ne forgesenda estas la belega vasta Kopenhaga amuzejo Tivoli, al kiu ĉiu kongresano dum la tuta semajno ĝuis senpagan eniron. Verŝajne ĝi estas unika en Eŭropo kaj sendube multaj kongresanoj tie pasigis belegajn horojn. Du kongresaj vesperoj estis rezervitaj por tiu gaja loko, sed certe al multaj ili ne sufiĉis!

LA SOLENA FERMO

La granda Zamenhof-salono de la kongresejo estis tute plena sabatonmatene por tiu ĉi lasta kongresa okazaĵo.

La ĝenerala sekretario, Prof. D-ro Lapenna, informis la kongreson pri la ĉefaj decidoj de la Komitato de UEA. La prezidanto akcentis, ke la Komitato laboregis dum la tuta semajno, ofte ĝis malfrue en la vespero, dum la plimulto de la kongresanoj ĝuis la kongresajn aranĝojn kaj distris sin. Fakte, la komitatoj estis la solaj, kiuj ne vidis la kongreson...

D-ro Szilagyi proklamis la rezultojn de la Belarta Konkurso kaj informis ke dank' al la Literatura Kaso ĉijare la premioj povas esti iom pli dignaj. Julio Baghy deklamis la poemon „Fluadoj” de Juan de Oyarzabal, kiu gajnis la unuan premion en originala poezio. D-ro Szilagyi disdonis la diplomojn kaj dankis al la konkursintoj — el kiuj pluraj bedaŭrinde ne povis ĉeesti — kaj al la juĝintoj, al la kongresaj instancoj, kiuj ebligis la Konkurson kaj al la donacintoj al la Literatura Kaso.

La reprezentanto de la dana instrumministro, Mag. Jens Rosenkjaer, kiu observis la kongreson dum la tuta semajno, faris en Esperanto jenan paroladon:

„Nome de la dana ministro por Instruo, Julius Bomholt, mi hodiaŭ esprimas al vi koran saluton. Mi petas al vi esti indulgaj rilate al mia provo prezenti ĝin en via lingvo. Mi dankas al vi, ĉar vi lokigis tiun grandan konferencon en nia lando. Ni esperas, ke ĝi estis granda helpo por via estonta laboro. Almenaŭ por ni, kiuj ekhavis kontakton kun la Esperanto-movado, ĝi estis granda travivaĵo. Persone mi permesas al mi diri: Mi apartenas al tiuj, pri kiuj D-ro Lapenna en sia brila festparolado dimanĉe diris, ke ili kredis esti objektivaj.

Multe pli ol mi supozis, mi travivis jenajn aferojn: kia eminenta interligilo Esperanto estas inter la multaj reprezentantoj, kiuj venis el ĉiuj regionoj de la mondo — kaj pli forte: Ke la oratoroj kiujn mi aŭdis, kapablas en Esperanto tiel vive kaj tiel varme esprimi siajn sentojn kaj pensojn, ke ili sukcesis fari ponton inter koro kaj koro.

Mi ripetas dankon al vi pro la spertoj de tiuj tagoj — kaj nome de la ministro mi deziras al via movado ĉiun bonan progreson en la venontaj jaroj — ankaŭ ĉar ĝi estas bona helpo por progresigi interkomprenon kaj komunecon inter la popoloj en nia emociplena kaj maltrankvila epoko.”

La prezidanto de LKK, S-ro G. Kühlmann, esprimis dankon al la kongresanaro pro la akurateco kaj disciplino, kiuj ebligis plenumon de la tuta ampleksa programo de tiu ĉi unua Universala Kongreso en Danlando. Li esprimas koran dankon ankaŭ al ĉiuj siaj kunlaborintoj.

S-ro Malmgren, en la nomo de la Estraro, Komitato kaj tuta kongresanaro plej kore dankis kaj laŭdis la organizintojn, kiuj povas esti vere kontentaj kaj fieraj. Tiu ĉi kongreso lasos neforgeseblan impreson en ĉies memoro. Akompanis liajn vortojn floroj por la honora prezidantino de LKK, F.ino M. Noll kaj por la tri sinjorinoj en LKK. Forta aplaŭdo konfirmis ĉi tiujn dankvortojn.

La inviton al la 42-a Universala Kongreso en 1957 en Marseille faris la ataŝeo ĉe la franca ambasadejo kaj samtempe direktoro de la franca Instituto en Kopenhago, kiu certigis, ke la urbestro de Marseille same bone gastigos la kongreson kiel lia Kopenhaga kolego. La parolanto akcentis, ke lia lando ĉiam deziras helpi al ĉiuj klopodoj, kiuj povos plibonigi la kunlaboradon inter la landoj.

Post tio Prof. Lapenna proklamis la nomojn de la novaj estraranoj de UEA.

Sekvis la adiaŭa parolado de S-ro Malmgren. Antaŭ ĉio li dankis pro la konfido, kiun li ĝuis dum pli ol 20-jara laboro en Komitato kaj Estraro. Bedaŭrinde, la sanstato nun devigas lin forlasi la postenon. Jam antaŭ 30 jaroj li havis antaŭ la okuloj tiun organizan formon, kiun la Asocio nun atingis kaj li estas tre feliĉa, ke li vidis tiun evoluon kaj povis aktive partopreni ĝin. La Asocio

nun estas la gvida centro de tutmonda informado. Sen la konfido de la membraro tia evoluo ne estus ebla kaj li varme rekomendas doni la saman konfidon ankaŭ al la nuna Estraro, kiu celkonscie daŭrigos la laboron.

Kun multaj plej diversnaciaj personoj li kunlaboris kaj kun ili la prezidinto travivis feliĉajn kaj malfacilajn momentojn. Li esprimas koran dankon al ĉiuj kunlaborintoj kaj precipe al S-ro Kennedy, kiu kiel vicprezidanto longe anstataŭis lin siatempe dum lia malsano. Speciale li dankis al siaj pli intimaj kunlaborintoj kaj tute aparte al Prof. Lapenna, kun kiu li havis en la lastaj jaroj preskaŭ seninterrompan kontakton kaj al kiu li deziras forton, sanon kaj energion por daŭrigi la laboron. Kelkfoje oni flustras, ke D-ro Lapenna agas diktatorece, ke li laŭplaĉe ŝanĝas statuton kaj regularojn kaj agas laŭ sia bontrovo. La prezidinto akcentis, ke estis ĝuste li, S-ro Malmgren, kiu iniciatis la statutŝanĝojn, ke ĉiuj ŝanĝoj ĉiam estis faritaj laŭ decidoj de la tuta Estraro aŭ Komitato kaj ke estis ĝuste D-ro Lapenna, kiu ĉiam disciplinite submetiĝis al la plimulto, se la aliaj estraranoj aŭ komitatanoj ne samopiniis kun li. Li avertas la esperantistan publikon kontraŭ perfidaj disflustroj kaj rekomendas al ĝi ne fidi je onidiroj, sed en tiaj kazoj turni sin al la kompetentaj instancoj por peti informojn. „Se vi ne fidus iun komitatano, turnu vin al via landa asocio, por ke ĝi elektu aliajn kaj havu konfidon, ĉar danĝeraj estas la flustradoj.”

Nia kontraŭuloj ekster la movado estas multnombraj. Ĝenis ilin nia agado en Montevideo, ĝenis ilin nia tiea reprezentigo, malkonvenas al ili nia sistemo, laŭplana agado kaj la konstanta progresado de nia afero, kiun ili ne scias kiel bremsi. Nur unu eblecon ili havas: Subfosi niajn proprajn vicojn, krei malkonkordon inter ni, suspektigi niajn gvidantojn. Se ili sukcesos, ili venkos nin. Se niaj gvidantoj lasos la organizaĵon, ĝi estos kiel granda domo konstruata sen arkitekto, lasita al masonistoj kaj ĉarpentistoj. La prezidinto ripetas la iamajn adiaŭajn vortojn de Generalo Bastien: „Estu toleremaj”, kaj il aldonas, ke sen laŭplana agado, sen reciproka subteno, sen forta organizaĵo ĉiu laboro restos vana, sed ke, se la esperantistoj restos solidaraj, nenio povos haltigi la venkon de Esperanto. „Apogu unu la alian! Konservu la unuecon!”

Nun ekparolis Prof. Lapenna, al kiu donis la Komitato la plej agrablan, sed samtempe plej malfacilan taskon, kiun li iam ricevis, nome, danki la adiaŭantajn prezidintojn kaj vic-prezidintojn en la nomo de la membraro kaj Komitato pro iliaj grandegaj meritoj por la afero de Esperanto. Prof. Lapenna diris, ke dum la milito li vidis multajn ekzemplojn de granda kuraĝo, sed neniam li vidis tian kuraĝon porpacan, kian montris S-ro Malmgren, kiam dum multaj monatoj li, malsanega, devis senmove kuŝi en la lito kaj intertempe neniam

ĉesis pensi kaj okupiĝi pri la gvidado de la Asocio, daŭre forte interesiĝis kaj ĉiam donis bonajn konsilojn pri la laboroj.

Dum la longa kunlaborado estis kelkfoje ankaŭ malsamaj opinioj kaj diskutoj, sed ĉiam restis la reciproka estimo kaj amikeco. La Komitato demandis sin, kiel honorigi ambaŭ adiaŭantojn, kiuj ne deziras honoran membrecon. Apelacio al la membraro kaŭzis en kelkaj semajnoj grandegan alfluan de financaj rimedoj. Tiel li nun povas transdoni al la prezidinto plenan arĝentan fruktuĵon kun gravuraĵo. „La arĝento simbolas vian koron, la fruktoj la rezultojn de viaj laboroj” estis la vortoj, per kiuj Prof. Lapenna transdonis la donacon al S-ro Malmgren.

Al S-ro Kennedy la membraro donacis la plej belan kamenhorloĝon, kiu estis trovebla en Londono. Sub tondraj aplaŭdoj ambaŭ adiaŭantaj funkciuloj akceptis la donacojn.

Al S-ro Ernŝtred Malmgren, Prezidinto de U.E.A. ni kore deziras reŝertigon kaj plenan resaniĝon.



S-ro David Kennedy, Vic-Prezidinto de U.E.A. ĝuu merititan ripozon post longa funkciado.



Apartan dankon la ĝenerala sekretario esprimis al sinjorinoj Malmgren kaj Kennedy, kiuj estis ne nur la edzinoj de la prezidintoj, sed kiuj kiel aktivaj esperantistinoj multege helpis kaj subtenis la laborojn de siaj edzoj. Ambaŭ sinjorinoj ricevis belajn florbukedojn.

Sinjoroj Malmgren kaj Kennedy kortuŝite dankis pro la donacoj kaj S-ro Kennedy, kiu ĉeestis jam la kongreson de 1911, aldonis ke li deziras iom ripozi, sed ke li ne dormos. Cetere, ankaŭ tiu ripozo estos nur relativa, ĉar ambaŭ ekŝigantaj funkciuloj promesis daŭrigi sian specialan laboron sur la kampo de Esperanto en la lernejoj.

Fine, S-ro Malmgren transdonis la prezidantan martelon al Prof. D-ro G. Canuto, la nova prezidanto, kiu en sia ferma parolado diris, ke estos malfacile sekvi tiel diligentan funkciulon, kiel estis S-ro Malmgren, sed ke li faros sian eblon kun la helpo de la du vic-prezidantoj. Prof. Canuto donis ankoraŭ mallongan superrigardon pri la evoluo de Esperanto sur kultura kampo. La lasta kongresa ago estis la transdono de la grandega kongresa flago de LKK-Kopenhago al LKK-Marseille, post kio la tuta ĉeestantaro kantis la himnon.

Tiel finiĝis la 41-a Universala Kongreso de Esperanto. Vivu la 42-a!

Novaj Libroj

Duope ricevitajn verkojn ni recenzas; unuope ricevitajn ni nur mencias.
*) ricevebla ĉe U.E.A.

DIALEKTO, DIALEKTIKO *) de Delfi Dalmau. Eld.: Belpost, Aparf. 5164, Barcelona, 1956. 88 p. Formato: 16 × 12. Broŝurita. Prezo: 10 steloj (rabatita por kursoj).

Nia kataluna kaj esperantista patrioto, Delfi Dalmau, havis la bonan ideon, represigi kaj kompletigi plurajn el siaj jam en diversaj gazetoj aperintaj artikoloj, kaj fari tion tiamaniere, ke pere de interĉapitre enmetitaj paroligaj demandaroj la libreto fariĝas taŭga por uzado en supera kurso. Esperanto bezonas tiajn verkojn, kaj tiun mankon ĉi tiu verko bone kontribuas forigi.

Ĉar la titolo, celante vekti scivolemon, povus samtempe efiki fortimige, ni tuj klarigu, ke per tia vortludo la aŭtoro deziras atentigi pri tio, ke Esperanto, kiel ĉiu lingvo, neeviteble respegulas la personecon de la uzanto. Ĉiu havas sian propran manieron, paroli kaj verki en lingvo; kaj same ĉiu havas sian propran sintenon rilate la problemojn de la vivo. Do temas pri Stilo kaj Ideologio. Sentile esperi aŭ eĉ postuli, ke inter Esperantistoj ĉiam regu perfekta identeco de vidpunktoj, ĉu en lingva, ĉu en alia rilato. „Ni estu skrupulemaj, singardemaj, sed ne ektimegu tuj, kiam nian lingvon atakas malsaneto, malpurajo, erareto, fuŝeto.” (p. 76). „Zamenhof ekzemplis al ni pri komprenemo” (p. 53) kaj „per komprenemo, indulĝemo, ni devas mildigi nian interrilatadon, eviti... malsaĝajn kverelojn” (p. 6). Jen la grava leciono, kiun la aŭtoro tiras el la vero kaŝita malantaŭ sia titolo.

La faritaj citaĵoj montras la fadenon kiu trakuras kaj kunligas ĉi tiujn artikoletojn, kun ilia tamen tre varia enhavo. La plej longa (11 paĝoj) havas interesajn aŭtobiografiajn detalojn kaj tuŝas la demandon, ĉu „aktiva poliglotismo” (t.e. la uzo de pluraj lingvoj en la parolo) ne estas rekte mulutila al la estrado de gepatra lingvo, kiel S-ro Dalmau mem, surbaze de longa sperto, kredas. Aliloke (p. 47) li esprimas la originalan ideon, ke „Esperantismo de rusoj kaj angloj, kastiloj kaj ĉinoj estas pli mal-egoista, pli nobla, ol esperantismo de nacioj kies lingvo estas malavantaĝa en la internacia kunvivado”, kaj li memorigas al ni, ke post la lingva venko daŭros la homarana batalo (p. 80). Lia

averto pri la diversaj danĝeroj minacantaj Esperanton (kreskanta okcidenteco, multobligo de sinonimoj, uzado en prozo de „poeziaj” vortoj) trovos espereble bonan aŭskulton.

Stile la libreto estas plene kontentiga, konforme al la evidenta respekto kiun havas la aŭtoro por la personeco de Zamenhof. Lia propra „dialekto” respeguligas tamen en eble troa favoro por triopajoj, kiel „kredis, kredas, kredos” (p. 6), „kreita, kreata, kreota” (p. 10), „vivo, viveco, vivado” (p. 12), „komprenas, konscias, rifuzas” (p. 26); „celo, signifo, senco” (p. 71); kaj por duopajoj, kiel „kompreni, komprenigi” (p. 6), „konsciigi kaj konsciigi” (p. 9); „trompi kaj trompigi” (p. 25), „fundamenta solvo kaj solva fundamento” (p. 43). Sed estas sendube, ke kursanoj kiuj alproprigos al si la vortojn kaj frazojn de la aŭtoro por povi respondi al la paroligaj demandaroj, estos farintaj grandan paŝon antaŭen. Kaj samtempe ili eble estos sorbintaj iom el tiu kataluna kvalito, „seny” (saĝo), pri kiu S-ro Dalmau skribas kaj kiu sentiĝas en ĉiu paĝo *).

D. B. Gregor

*) Al la listo de preseraroj je p. 87 estas aldonendaj 22 aliaj, ĉiuj tamen negravaj, krom graŭ anst. laŭ (p. 9). Je la lasta linio de paĝo 63 legu pri.

TARTARIN DE TARASKONO *) de Alphonse Daudet. El la franca trad. Jean Delor kaj Paul Le Brun. Ilustris Lucien Guezennec. Eld. Heroldo de Esperanto, 1956. Tole bindita, formato: 20 × 14. Prezo: 6.60 gld.

Jen mistralas en Esperantujol Timiane aromanta kaj sible vibranta pro la kanto de la sunebria cikadoj, glora blovo distamtamas la heroaĵojn de „la sentima, la granda, la senkompara Tartarin de Taraskono”, leonmortigisto. La neordinarajn aventurojn de la bravaĉa famulo, klasika tipo de la provenca „gal-ejado”, fidele tradukis Jean Delor kaj Paul Le Brun el la spritoria romano de A. Daudet.

Por la verkintoj necesis zorgi, ke estu freŝe konservataj ne nur la esenca medio de sudfranca urbeto, kun la naivaj moroj de ĝia simplanima etpopolo, sed ankaŭ la emfazaj dirmanieroj, eĉ la lokaj esprimoj foje punktataj de ajlo, kutime

uzataj de ĝiaj loĝantoj. Mi devas konfesi, ke brila sukceso kronas tian dornan tradukadon. Mi frandis la historion per longaj glutoj, kvazaŭ safranaj fiŝsupon, kompreneble kun plenglaso da alĝeria vino.

Ankaŭ vi devas tiel ellegi tiun burleskan rakonton pri la memorinda vojaĝo de nia fanfaronulo al Afriko, kie kun li vi travivos hororajn okazaĵojn, indajn je Eneido. Mi promesas al vi gajhumoran vesperon, dum kiu vi mem partoprenos en ekstravaganca ĉasadon al nepafebla leono, kies felon vi tamen trafos kaj parade elmontros en Taraskono, kiel Aleksandro siajn persajn trofeojn. Kun la venkinto vi triumfe reeniros al lia patrujo, kie vi estos solene akceptata de la fierdelira urbanaro. Kaj se post tiel malsaĝa entrepreno vi ne ĝuos kristalajn ĝojon, se tiu alte spica „tartarinado” ne festos viajn lipojn per elkora ridego, mi certe ne regalos vin per tradicia anizlikvoro, kiam mi renkontos vin gapanitan ĉe la haveneto de Nice, kie la suno igas kantanta la tutan Lazuran Bordon.

Orajn laŭrojn al Heroldo kaj la pre-sisto por la belega prezentado de tiu libro, kiun ĉiu spritulo aperitive sorbos, kiam trodotos lin la galincita legado de lia ĉiumatena jurnalo.

Ribillard

LA MALPRUDENTA SCIVOLULO *) de M. de Cervantes Saavedra. 33a, 34a kaj 35a ĉapitroj de la verko „Don Kihoto”. El la hispana trad. kaj eldonis Luis Hernandez, Valencia, 1955. 68 p. Formato 20 × 14. Prezo: fr. fr. 240.

La jena verko prezentas 3 el la ĉapitroj de la fama „Don Kihoto”, kaj estas sekvo al laŭdire jam eldonitaj ĉapitroj, ĉar la tradukinto intencas iam prezenti la tutan eldonon de la verko de Cervantes. Laŭdinda kaj kuraĝa entrepreno! Se ĝi efektiviĝos tuta, ĝi aldonos al la jam ekzistanta juvelaro de mondfamaj verkoj esperanten tradukitaj unu konsiderindan ĉefmonumenton el la bela kaj sonora hispana lingvo.

La jenaj 3 ĉapitroj prezentas la fatalan historion de tiu viro, kiu, volante pruvi al si, kiom virtega estas lia edzino, pri kio li cetere ne dubis, submetas ŝin al danĝera eksperimento, kiu kompreneble perdiĝas ŝin, kaj sekve ankaŭ lin.

Kiel ofte okazas en la tiutempaj verkoj, estas multe malpli da agado ol da elmeto de sentoj kaj pensoj implikiĝantaj ĝis rezonado, kiu ofte turniĝas al io dialektikeca. Al nunaj legantoj, kiuj kutimiĝis al pli „vivaj” okazaĵoj, ĝi tamen ne ŝajnos laciga, tiel granda estas la arto de Cervantes en tiaj subtilaj sentmanovradoj.

Al tiu ŝato al la originalo certe helpas la traduko, kiu estas ĝenerale bona kaj flua. Mi ne povis kontroli la ekzaktecon de la traduko, ĉar en la riĉa biblioteko de 70.000-loĝantara urbo mi ne sukcesis trovi la tekston „in extenso” de la fama verko, sed ĝi kredeble estas tre fidela.

Ĝi ja entenas eraretojn kaj strangaĵojn, kiuj lastaj ŝajnis al mi idiotismoj. Sed en sia antaŭparolo al la verketo la traduk-

into tre malpedante petas — malofta ekzemplo — pri monro al eventualaj plibonigoj, kaj oni do absolvu lin je tiuj malgrandaj pekoj, kiuj certe malaperos en estonta eldono.

La libro estas bele prezentita: klaraj lertipoj sur bona papero, kelkaj plaĉaj desegnaĵoj kaj belega kovrilpaĝo plurkolora.

Roger Bernard

SENNACIECA REVUO 1956. Eld.: S.A.T., Parizo. 56 p. Formato: 18 × 22. Prezo: 2 gld.

„Universala lingvo kaj kosmopolitismo en la 18-a jarcento“ de A. Caubel, estas diversrilate interesa artikolo. Grandparte temas pri la rolo de la franca kiel internacia lingvo de tiu epoko. Li ŝajnas al mi prava, kiam li metas la devigan ĝeneralan militservon kiel la komencon kaj ĉefan kaŭzon de la nuna interŝtata vivo. La traktaĵo estas instrua kaj instiga. — „Kanado“ pritraktas tiun landon geografie kaj socie. La stilo estas sufiĉe enciklopedia. Kun tia temo tamen estas pli bone doni faktojn ol oratori. — „Marteno Fierro kaj ĝia aŭtoro“ de P. Bosso konatigas nin kun popola poezio en Argentino kaj la ĉefa verko de tiu arto, kiu laŭ la preparado kaj tradukspecimenoj ŝajnas aparteni al la malmultaj unikaj poeziverkoj. Kelkaj esperantaj tradukoj el tiu verko estus bonvenaj. — H. W. Alings skribas „Iom pri sindikata movado“ — en Nederlando. La finaj vortoj de lia artikolo meritis lokon de moto por la revuo. — Stefano La Colla atentokapte kaj instrue rakontas pri „La historio de la semajno“ kaj Kosinaka pri „Arompraktiko kaj nia civilizo“, t.e. fabrikado kaj uzado de aromajoj. — Régulo Pérez proponas prezentas „Pri liceco de novaj prepozicioj“: Ni faras diversajn vortojn el prepozicioj, ekz. sub, subulo, subigi. Kial ne fari ankaŭ male, uzi aliklasajn vortradikojn kaj prepoziciojn, ekz. anstataŭ „en la fino de la strato“ diri „fin la strato“? Ne estas loko tie ĉi pritrakti tian artikolon. Tamen iom: Al mi ŝajnas avantaĝe por lingvo havi nur la necesajn, klarsencajn prepoziciojn. Necezo kaj sufiĉo validas ne nur por vortformado. Ĉio kroma estas pli-malpli artifiko. Antaŭ ol enkonduki novajn prepoziciojn ni devas lerni korekte kaj bone uzi tiujn, kiujn ni jam havas.

La redakcio avertas antaŭ la artikolo de Pérez, ke la aperigo ne signifas rekomendon. Same ĝi devus fari antaŭ la artikolo de Stefan Voldan „Medicina scienco kontraŭ naturkuracado“, kiu laŭ enhavo devus havi la titolon „Naturkuracado kontraŭ medicina scienco“. Mi pledas nek por viando nek por alkoholo nek por nikotino sed por racio kaj certa modesto. Kiam la anoj de naturkuracado diras: *Ni konas la kaŭzon de malsano* (t.e. malsano ĝenerale, do = la malsanoj) *kaj la vojon al saneco*, tio nepre estas neracia troigo kaj sufiĉe malmaldesta. Same kiam oni en la nomo de la bonaj nutraĵoj el la vegeta regno kondamnas la kuracistojn kaj la medicinan

sciencon. Se la vegetaja dieto tiel efikus al la menso, ĝi havus almenaŭ unu nedezirindan sekvon. — An Kaŭ proponas novan, ciferan, skribsistemon por muziko. Fakuloj juĝu. — Krom tiuj artikoloj Ridmondo Schwartz ridpunktas en sia maniero, ofte kun serioza senco, kaj troviĝas poemoj de Baghy, Marjorie Boulton kaj N. B.

Mi pensas, ke la redakcio sen ofendi la verkintojn povus fari certajn korektetojn en la manuskriptoj: anstataŭigi neĝustan vorton per ĝusta, tro pezan esprimon per pli gracia. Tiaj mankoj troviĝas. Kvankam ne tro multaj kaj en si mem ne gravaj ili povas malbone efiki ĉe legantoj, kiuj ne perceptas ilin kiel mankojn aŭ erarojn.

Stellan Engholm

KLASIFO DE ESPERANTAJ TEMOJ) de M. C. Butler. Eldonis J. F. C. M. Dercks, Bergen op Zoom, Nederlando. 1950. 144 p. en formato 21 × 13,5 cm. Prezo: 10 ŝilingojn.*

La nombro de libroj en Esperanto estas jam tiel granda, ke serioza bibliotekisto devas apliki ian ordigan sistemon aŭ rezigni sin al kaoso, kie oni perdas tempon antaŭ ol trovi libron kaj eĉ riskas tute ne trovi la libron, kiun oni serĉas.

La grava biblioteko de la Brita Esperantista Asocio en la manoj de sia kuratoro Akademiano M. C. Butler jam antaŭ jardekoj solvis la problemon en kontentiga maniero, akceptante modifitan formon de la sistemo de usonano Dewey. Dewey uzis la ciferojn 0 ĝis 9 por dek ĉefaj klasoj de temoj. Ĉiun el tiuj klasoj li subdividis per aldono de dua cifero, do 00 ĝis 99. Tiujn cent subklasojn li ree subdividis 000 ĝis 999. Kaj tiel plu senfine.

En Parto I de sia KLASIFO S-ro Butler klarigas tiun decimalan sistemon, kiu, kvankam iomgrade internacia, bedaŭrinde ne estas tute same uzata en ĉiu biblioteko. S-ro Butler mem, ekzemple, kiel Generalo Sébert antaŭ li, uzas 41 por Internacia Lingvo, sed en la plimulto de bibliotekoj, kiuj uzas la Dewey-sistemon, 41 signifas Filologio Kompara.

En Parto IV S-ro Butler donas liston de la Dewey-ciferoj kaj temoj, kiuj havas specialan valoron por Esperantistoj, ekz. 372.6 = Lingvinstruo en lernejoj. Li ankaŭ tie montras, kiel li subdividas sian klason: 41 Internacia Lingvo.

412 Esperanto estas tre detale subdividita en Partoj II kaj III de la KLASIFO, kiu, valora aldono al la Dewey-ciferaro, analizas nian movadon en Parto II kaj nian lingvon en Parto III. Precipe tiuj partoj estas utilaj al ĉiu Esperantisto, ĉu kun intereso pri libroj, aŭ ne. Kursgvidonto embarasata pri elekto de metodo, studanto scivolema pri gramatikaj problemoj, tradukanto serĉanta novan terminon, aŭ propagandanto, kiu renkontas novan argumenton kontraŭ nia lingvo, povas rapide trovi solvon. La ciferaĵoj indikiloj estas multe pli ol

teoriaj proponoj. S-ro Butler jam uzis ilin dum multaj jaroj, kaj sur liaj indeksaj slipoj oni trovas referencojn al gravaj artikoloj en gazetoj ĉiulandaj.

Tamen la Klubo Esperantista de Malmö ĵus eldonis SISTEMAN LIBRO-LISTON de sia biblioteko. Anstataŭ ciferoj ĝi uzas literojn laŭ la modelo de multaj svedaj bibliotekoj. La ĉefa avantaĝo estas, ke oni havas 28 literojn anstataŭ nur 10 ciferoj por la ĉefaj klasoj, kaj aldono de dua litero (aa ĝis zz) donas 784 subgrupojn anstataŭ la nur 100 subgrupoj de decimala sistemo (00 ĝis 99). Tiel oni evitas longajn signojn por subklasetoj, kaj oni povas uzi la supersignitajn literojn de Esperanto por nur Esperantaj temoj sen risko kolizii kun naciaj sistemoj.

„Se ĉiu Esperanta biblioteko uzus saman sistemon, tio faciligus interŝanĝon de libroj, informoj, kaj ideoj.“ Tiuj vortoj de S-ro Butler estas evidantaj. Sed li diras ankaŭ: „klasifo estas afero iugrade subjektiva“. Kaj, se Esperantistaj bibliotekistoj ne baldaŭ decidus uzi saman sistemon, diversaj sistemoj estos tiel firme establitaj en diversaj lokoj, ke por interrilati bibliotekisto devos adopti duan internacian sistemon! Tiun internacian sistemon ni devas havi jam nun.

Ĉu ni adoptu la Dewey-sistemon malgraŭ ĝia rigideco kaj komplikeco? Ĉu ni adoptu la pli flekseblan sistemon de la svedoj malgraŭ ĝia ankoraŭ limigita uzo? Aŭ ĉu ni adoptu hibridan sistemon de literoj plus ciferoj? Aŭ ĉu ĉiu Esperantista bibliotekisto uzu du sistemojn?

Edward Ockey

ESPERANTO, la langue „passerpartout“ pour tous. Lernolibro, 18-leciona gramatiko de Esperanto, de Jean Cou-teaux, honora Prezidanto de U.E.F., Kolekto NOVA, Mulhouse. 128 p. Formato 11.5 × 17.5. Prezo: 325 fr. fr.

Sinjoro Jean COUTEAUX, iama lingvokomitato, kiu okupis dum multaj jaroj plej gravajn postenojn en la franca movado, prezentas al la franca publiko lernolibron, kiu estas la frukto de 50-jara praktikado de Esperanto.

Tiu ĉi manlibro estas tre bone farita. La lecionoj prezentas simple, sed ĉiam tre klare, la diversajn elementojn de la lingvo, kaj la plano estas ĝustadoze gradigita. Le ekzercoj enhavas multajn frazojn-ekzemplojn, kiuj surprize kontrastas kun la ofte renkontitaj banalajoj en similaj metodlibroj. Same pri la vortlistoj, kiuj temas i.a. pri socio, ekonomio, kampadismo, ktp. Ĉefe trafaj estas la prezento kaj klarigoj de la refleksivo kaj de la partipoj. Ankaŭ tre bonaj estas tiuj pri la tempoj kaj modoj de la verbo. Mi estus ankoraŭ pli kontenta, se la aŭtoro uzus la terminon „volitivo“ por la esperanta modo respondanta (aŭ ne respondanta!) al la francaj imperativo kaj subjunktivo. Ĉu iam, en franca gramatiko pri Esperanto, oni fine trovos tiun, nuran ĝustan, terminon?

Resume, tre laŭdinda studlibro, kiu honorigas sian aŭtoron. Roger Bernard

Tra la movado

Malgraŭ nia deziro, ni estas devigitaj, pro la inunde alfluinta materialo, senkore skeletigi ĉi-sube tre multajn interesajn raportojn:

En Graz, Aŭstrujo, okazis de la 19a ĝis 21a de majo *Internacia Renkontiĝo*, kiun partoprenis preskaŭ 300 samideanoj, inter ili multaj el Germanujo, Italujo, Jugoslavio, Svedujo kaj eĉ el Kalifornio (Usono). La urbestro, Prof. d-ro *Speck* akceptis 20 delegitojn kaj salutis la Renkontiĝon.

D-ro Hideo *Ŝinoda*, kaj la redakcio de la gazeto „*Oomoto*”, ambau en Japanujo, sendis laŭ peto de nia samideano d-ro *Oskar Meister* en Graz al la botanika ĝardeno de la Graza universitato valorajn semojn. D-ro *Meister*, kiu tradukis la kernajn esperanto-leterojn en germanan lingvon, transdonas ankaŭ al la popolsciencia (folkloristika) muzeo en Graz regule hispanajn popol-legendojn, kiujn li ricevas de nia samideano *Gabriel Mora* el Manreso (Hispanujo) en interŝanĝo kontraŭ aŭstriaĵaj popol-legendoj.

En Orienta Germanujo nia movado nun jam videble kreskis. La 27an de majo kunvenis pli ol 50 gesamideanoj el 19 lokoj de DDR (Or. Germ.) en la bela mezepoka urbo *Meissen*.

La ministerio por Edukado en Provinco Santa Fé, Argentino, laŭ oficiala Rezolucio N-ro 5520, rajtigis la klubon en *Venado Tuerto* instrui Esperanton en la loka ĉefa publika Elementa Lernejo „*Mariano Moreno*”.

En Northern Counties Training College, Anglujo, *Marjorie Boulton* faris interesan eksperimenton. Ŝi penis instrui kiel eble plej da Esperanto al kelkaj forirontaj studentinoj dum la lastaj tagoj de la trimestro. Dum 15 horoj la klaso trastudis la tutan formalan gramatikon, preskaŭ finlegis simplan libron, kaj kantis multajn simplajn Esperantajn kantojn. Post la 15-hora fulm-kurso, kiu daŭris dum nur 4 tagoj, la studentinoj verkis simplajn Esperantajn eseojn. Inter ili la plej malbona restis komprenebla, kaj la tri plej bonaj estis ja prifierindaj specimenoj de inteligenta komencantina laboro.

Jus aperis la jarraporto de *Norvega Esperantista Ligo* pri la jaro 1955. N.E.L. havis en tiu jaro 28 lokajn grupojn kaj sume 849 membrojn. Oni aranĝis inter la grupoj konkurson similan al la internacia konkurso de U.E.A.; la konkurson gajnis la grupo LA GLACIARO en Odda, kiu atingis 225,0% de sia kvoto. N.E.L. havas sliparon pri ĉiuj personoj, kiuj partoprenis Esperanto-kursojn; tiu sliparo estas preskaŭ kompleta post 1930 kaj enhavas nun 8492 slipojn pri personoj en 546 lokoj. Okazis en la lando 28 kursoj kun 284 kursanoj. En la grupoj 143 membroj laboris en 20 stud-

rondoj. La koresponda kurso havis 114 novajn lernantojn. Gazeta kurso aperis en 2 gazetoj, 11 personoj trapasis la superan kaj 16 la elementan ekzamenon.

En Teheran en Irano emeritiĝis kiel delegito laŭ sia peto *Sinjoro B. Ŝidani*, kiu dum 45 jaroj sindone kaj modele laboris por Esperanto, eldonis librojn, disdonis sennombrajn lernolibrojn kaj propagandilojn kaj sencese subtenis kaj helpis la movadon materie kaj morale. Nun, atinginte jam tre altan aĝon kaj havante delikatan sanon, S-ro *Ŝidani* decidis transdoni la oficon al pli juna samideano. Decas ĉi tie esprimi grandan dankon al S-ro *Ŝidani* pro la multaj kaj gravaj servoj faritaj al la movado.

Por festi la Jubileon de la Skolta Movado, la instancoj okazigos grandan *Jamboreon*, *Indabon* kaj „*Moot'on*” (kunveno de Roveraj Skoltoj) en *Sutton Coldfield Park*, apud Birmingham, Anglujo, de la 1-a ĝis 12a de aŭgusto 1957. Oni atendas, ke 35000 skoltoj el 40 landoj partoprenos la eventon. La Brita Sekcio de Skolta Esperantista Ligo intencas organizi kunvenon por Esperantistaj Skoltoj. Kompreneble estos pli facile tion fari se la organizantoj povos konstati proksimume kiom da esperantistaj skoltoj ĉeestos. Do oni estas petata sendi sian nomon kaj adreson al: S.E.L., 42 Westbourne Street, OLDHAM, Lancashire, Anglujo.

La sudsveda, universitata urbo *Lund* eldonis novaranĝitan broŝureton en Esperanto kiu mencias la historion kaj la vidindaĵojn de la urbo. Kontraŭ 1 respondopuno oni povas ricevi ĝin ĉe *Drätselkammaren, LUND, Svedujo*.

Lundon la 21an de majo je la 9 h.p.m. en la salono de la urba naturhistoria muzeo de *Verona* *journalisto* *Bertram POTTS* paroladis pri la temo „*Nova-Zelando hieraŭ kaj hodiaŭ*”. Post mallongaj vortoj rilataj al historio kaj geografio de la lando, la parolinto detale priskribis la morojn kaj kutimojn de la *Maorioj*, la indiĝenaj loĝantoj de *Nov-Zelando*. La konferenco okazis en Esperanto, lerte tradukita en italan lingvon de *Dokt. Bonomi*, kaj vekis vivan intereson de la publiko.

Dum la Kvina Internacia Kunveno por la Paco kaj la Kristana Civilizeco, kiu okazis de la 21a ĝis la 27a de junio en la historia Palazo Vecchio en *Firenze*, la Konsulo de Respubliko de Sankta Marino, Adv. *Paŭlo Lepanto Boldrini*, faris paroladon en Esperanto.

En la n-ro 4 de *CULTURA*, portugala revuo kiu okupiĝas pri popoleduko kaj estas redaktata de aro de junaj intelektuloj sub la direkcio de *Dro Frazao de Faria*, konata nomo en la portugala esperanto-movado, aperis tripaĝa artikolo pri Esperanto.

Kursofino en La Laguna



Finiĝis en junio la unua oficiala Esperanto-kurso en la Universitato de la Laguna (Kanariaj Insuloj). Enskribiĝis 60 personoj, inter kiuj troviĝis pluraj universitataj profesoroj. La kurso okazis du-foje semajne en la kadro de la Instituto pri Lingvoj de la Universitato — kredeble la unuan fojon, ke hispana universitato starigis oficialan instruadon de Esperanto. Ĉe la kursfina ekzameno sukcesis 35; ĉar la Universitato aranĝas la studojn pri vivaj lingvoj je du kursoj, tiuj 35 kaj la aprobotoj dum septembro venonta rajtas viziti la duan kurson venontjare.

*Sur la foto sidas meze *Docento* *Juan Régulo Perez*. Kelkaj aliaj personoj estas: *D-ro Elías Serra Raŭols*, dekano de la *Filozofia-Beletra Fakultato* (unua vico, 3a de dekstre); *S-ro Ángel Pombrol Hernández* (unua vico, 2a de dekstre); *D-ro José Roberto Vivas*, konsulo de *Venezuelo* en *Santa Cruz de Tenerife* (unua vico, maldekstre). Aliaj aktivuloj el *Santa Cruz de Tenerife* estas *S-ro Pedro Reyes Rodríguez* (tria vico, 3a de dekstre), kaj *S-ro Vicente Pérez Torres* (tria vico, 7a de dekstre).*

La 22a Nov-Zelanda Esperanto-Kongreso, okazos en la bela urbego, Wellington, la ĉefurbego de Nov-Zelando de la 28a de decembro, 1956 ĝis la 1a de januaro, 1957. Bonvolu sendi salutojn al la Kongres-Sekretario, S-ro V. R. Moore, P.O. Box 330, Wellington C. 1, Nov-Zelando.

Dum Pentekostaj Ferioj, 24 gegrupanoj de Esperanto-grupo „Unueco” el Saint-Claud (Charente) restadis ĉe kastelo Gresillon kune kun 15 Parizanoj kaj kelkaj samideanoj el urboj Tours, Angers kaj Cholet.

La arta fako de la Sao Paŭlo Esperanta Klubo, Brazilo, tre vigle aktivis. Ĝia koruso, sub direkto de la reĝisoro de Mozartéum do Brasil, partoprenis koncertojn en la Muzeo de Arto kaj en la Salono de Koncertoj Schwartzmann, kiuj estis ankaŭ dissenditaj per Radiostacio Gazeta, kaj vaste raportitaj en la gazetaro. La kantado okazis kompreneble en Esperanto, kaj la radio-anoncisto plurfoje substrekis tiun fakton. La Muzikan Scenan Trupon de la Grupo prezentadas teatraĵojn, parte en naciilingvo, parte en Esperanto, ne nur en la urbaj teatroj sed ankaŭ per la Televidea Radiostacio Paulista. Krom tio oni faris gramofondiskon por disvendado: kantis Norma Guerrini, kaj ĉe la piano estis Clarisse Piconez Maetro Tobia Perfetti, kaj Moacyr Gaia. Esperanto ludas gravan rolon en la kultura vivo de Sao Paŭlo!

Le plej malnova Esperanto-asocio ekzistanta en Brazilo kaj ankaŭ en Latinameriko — Brazila Klubo „Esperanto” en Rio de Janeiro — festis je la 29-a de junio de la kuranta jaro sian Jubileon. Nuna Prezidanto estas D-ro Miguel Timponi, iama Ministro de Internaj Aferoj kaj Sekureco de Federacia Distrikto, sub kies gvidado la klubo multe helpis al la venko de Brazilo en la Internacia Konkurso en du sinsekvaj jaroj.

DU GRAVAJ NOVAJ REVUOJ

Lastatempe atingis nin la unuaj numeroj de du novaj revuoj, kiujn ni firme rekomendas al ĉiuj esperantistoj.

GEOGRAFIA REVUO estas la organo de la Internacia Geografia Asocio. En tre oportuna kaj impresanta formato (16,5 × 23,5), ĝi prezentas sur 32 paĝoj, bele presitaj kun multegaj ilustraĵoj, interesajn artikolojn pri la landoj de la mondo kaj iliaj loĝantoj. Jen kelkaj titoloj el la unua numero: „Esplorvojaĝo tra Amazonio”; „La Internacia Geofizika Jaro”; „Lukto de la Antarktaj Ekspedicioj”; „Mia Ascendo al Elbruso”; „La Valo de Reĝoj”, k.a. Estus malfacile troigi la intereson kaj valoron de tiu ĉi revuo kaj la allogon de ĝia aspekto. La dua numero, aperonta dum la nuna monato, enhavos verŝajne eĉ 52 paĝojn. Mi estas certa, ke la esperantistoj volonte subtenos ĉi tiun kuraĝan entreprenon, kies jarabono (unu usona dolaro aŭ egal-

valoro) estas cetere tre modera. La redaktoro estas Lic. Tibor Sekelj. Oni povas pagi la abonon al la Administra Oficejo de UEA, aŭ al reprezentantoj, kies adresojn oni povas ricevi ĉe: Nina Vidervol, Prazakova 12/III. 1., Ljubljana, Jugoslavio.

El Japanujo venas la unua pure literatura revuo el oriento: PROMETEO, kaj ĉiu literaturamanto bonvenigos ĝin, ĉar la japana kulturo estas ĝis nun tre modeste reprezentita en niaj randoj. La unua numero (32 paĝoj en formato 15 × 21) ankaŭ prezentas belan aspekton kaj riĉan enhavon de rakontoj, artikoloj kaj poemoj. Kiom oni povas juĝi, la revuo altiris la kunlaboradon de ĉiuj ĉefaj talentoj en Japanujo, kaj, kiel oni scias, ilia nombro ne estas malgranda. Provizore la gazeto aperas kvarfoje jare, kaj estas abonebla ĉe: Nakatu-hamadōri 2-20, Ooyodo-ku, Osaka, Japanujo. Jarabono kostas 300 jenojn aŭ 12 respond-kuponojn (560 jenoj = 1 usona dolaro).

Oni konstatas, ke nia revua kulturo estas nuntempe en tre sana stato. Kun „La Nica Revuo”, „Norda Prismo”, „Scienca Revuo”, „Medicina Revuo”, „Internacia Pedagogia Revuo”, kaj la du supre priskribitaj — por ne menciiti la malnovajn fidindulojn, kiel ekzemple „Heroldo”, kaj plurajn oficialajn kaj naciajn altkvalitajn organojn — la esperantistaro estas bone servata. Ĝi montru sin inda per grandskala subteno kaj abonado!

W. A.

Pigmaliono de G. B. Shaw esperantlingve en Praha

Verda Ĉaro de Julio Baghy prezentis tiun ĉi faman komedion je la 4a de junio 1956 en esperantlingva traduko de Eva Suchardova. La traduktasdo estis ankoraŭ pli malfacila ol ĉe Mariša. La ĉefrolantino parolas en la unuaj du aktoj per londona argoto, ŝia patro per argoto alispeca. La tradukintino paroligis sian Elizan Doolittle per primitiva lingvaĵo malhavanta ofte akuzativojn, pekanta kontraŭ akordiĝo de adjektivoj, evitanta gramatikan logikecon kaj tamen klare esprimanta la dirotajn. Lingvaĵo de la patro estas ankaŭ primitiva, sed kun nuancoj akcentantaj lian konvinkon pri propra sagaceco. La lingva problemo en traduko de tiu ĉi verko estas tre grava. La lingvaĵo estas ja la temo de la komedio. La dua ĉefrolanto, profesoro Higgins, estas fama scienca esploranto de londonaj slangoj, argotoj, dialektoj, kaj perlaboras riĉan bonfarton instruante por alta prezo senmankan, korektan, altnivelan lingvaĵon, kaj ankaŭ altnivelan konduton de riĉa societo, mem kondutante senzorge kaj neĝentile, ĉar li ja estas jam riĉa. Trovinte hazarde la stratulinon Liza, kiu mendas de li instruadon, li sukcesas lernigi ŝin dum ses monatoj tiel bone, ke ŝi ne diferencas de dukino. Sed trafas lin sorto de la legenda skulptisto Pigmaliono: li enamiĝas en sian kreitaĵon.

La prezentado estis tre sukcesa. La traduklingvaĵo eminentis pro facila komprenebleco kaj pro distingo inter la parolantoj. Suchardova ludis Lizan Doolittle, ŝiaj frazeroj, ŝiaj gestoj en la unuaj du aktoj ridigis kaj kortuŝis. En la tria akto, kiam ŝi venas por fari unuan ekzamenon pri rezultoj de la instruado, ŝia aktorina arto kulminis. Ŝi parolis singarde per lingvaĵo korektega kaj same korektege kondukis. Kiam ŝi sentis kreskon de amika etoso inter la te-trinkanta societo, ŝi kuraĝis krei proprajn frazojn kun propraj parolturnoj, nevole timigante la instruinton. Kiam ŝi diris „mi fajfas pri tio”, tre sincera rido susuris tra la teatro. Kaj kiam post ŝia foriro unu el la gastinoj ripetis tiun parolturnon moke



Supre ni vidas scenon el la dua akto de „Pigmaliono”, prezentita esperantlingve en Praha. Jen estas Suchardova (Liza Doolittle) kaj Sadlo (Profesoro Higgins).

al Higgins, despli ni ĉiuj ridis. Suchardova estas profesia aktorino. Profesoron Higgins ludis Dr Pr. Sadlo. Li estas amaturo, sed sur scenejo sperta, ĉar li estas muzikisto, fama virtuozo je violonĉelo. Li ludis sian rolon kun granda talento, kaj sukcesis prezenti la senĝenecon de juna bonfarta lingvisto per rimedoj pli delikataj ol tion foje faras eĉ famaj profesiaj aktoroj. Ankaŭ lia masko tre respondis al la rolo: svelta junulo kun duongrizaj haroj, manoj ofte en poŝoj de la jakto, kaj same senĝene kutima al frako de la kvara akto. Kolonelo Pickering (Ondraček) estis por li bona kunludanto. A. Seeman, dua profesia aktoro de la Verda Ĉaro, ludis patron Doolittle per maniero de sperta teatra artisto. Li estis reĝisoro de la teatraĵo, kaj ankaŭ la bona prezento de la tuto estis lia merito.

Oni ludis la komedion sen mallongigoj, en simplaj sed taŭgaj dekoracioj kaj en tre respondaj kostumoj. Estu tie ĉi enskribitaj ĉiuj, ĉar ili ĉiuj ebligis tiun ĉi prezentadon, kiu signifas unu el pluaj venkoj de la Verda Ĉaro de Julio Baghy: E. Riháčkova ludis sinjorinon Higgins, Nyvltova s-inon Hill, Drapakova f-inon Hill, Pastor Fredon Hill, Bartočíkova s-inon Pears, gapulon Kynčl, servantinon Rejtharkova. La teatro Mala scena estis preskaŭ komplete plena, ĉirkaŭ 250 vizitintoj.

S. K.

Eldonisto de filmstrioj en Zeist, Nederlando, eldonas kolorstrion pri Martin Krpan.

En la numero julio-aŭgusto 1955 de nia revuo „Esperanto” nia samideano Stellan Engholm recenzis la libron „Martin Krpan” de Fran Levstik. Speciale li atentigis la tutpaĝajn ilustraĵojn kaj li finis:

„Tiun libron mi ofte legos kaj rigardos. Aĉetu ĝin kaj faru same. Vi povas ankaŭ doni al infanoj kaj legi ĝin por infanoj, sed neniu estas tro aĝa aŭ tro saĝa por povi legi ĝin por propra plezuro.”

Kiel certe multaj, mi sekvis la konsilon, legis kaj relegis ĝin kaj admiris la belajn kolorbildojn, ĝis fine mi decidis nepre prelegi pri ĝi dum ia vespero. Sed kiel akiri lumbildojn de la bildoj? Post informiĝo ie kaj tie mi fine turnis min al eldonisto de filmstrioj por lerneja uzado en mia urbo. Sed, ho ve, la kostoj estis tro altaj por unufoja uzo. Vidante min en embaraso la entreprenisto faris pro-

ponon. Li akiru la eldonrajton de filmstrio kun nederlando teksto, kaj se mi helpus lin en tio, mi senpage ricevus filmstrion. Miaflanke mi nun faris la kondiĉon, ke en la teksto estu menciata, ke ĝi estas traduko el la Esperanto-eldono de la Slovenia Esperanto Ligo.

Post kiam tiu Ligo komunikis al mi, ke ĝi cedis ĉiajn rajtojn aŭ rekompencojn por aŭtoreco, la entreprenisto, Sinjoro J. S. van den Nieuwendijk el Zeist, Nederlando, kompilis la filmon. Sinjoro P. Enkelaar, instruisto en Zeist, kaj mi kompilis Nederlandan tekston, ĉerpitan el la libro kaj adaptatan al lernejaj bezonoj.

La eldono nun estas en la katalogo de la filmstudio „Fibo Beeldonderwijs”, Utrechtseweg 66—68, Zeist Nederlando, sub la numero kaj titolo: No. 214, „Martin Krpan”, (Een Sloweens Volkssprookje). La kostoj de la strio kun 30 bildoj kaj teksto estas 12,50 ned. gld. Montru vian intereson kaj mendu la strion kun la mirinde belaj kolorbildoj!

R. Slot

La kronprincino de Nederlando kaj Esperanto

Nederlando estas lando kun konstitucia monarkio. Ĝi posedas reĝan familion multŝatatan en la tuta lando pro ĝia ekstrema demokrateco kaj varma koro. La familio konsistas el simpatiaj gepatroj kaj kvar ĉarmaj knabinoj, edukataj kiel eble plej multe kiel aliaj, nereĝaj infanoj.

La plej aĝa el ili, la kronprincino Beatrix, serioze preparanta sin por la iama reĝa tasko sed samtempe entuziasma sportulino kaj rimarkinda skulptistino, fariĝis 18-jara en la pasinta vintro kaj tio signifis por ŝi plenaĝiĝon. Ĉi somere ŝi bonsukcese faris sian abiturientan ekzamenon kiel miloj da aliaj 18-jaraj gejunuloj. En oktobro ŝi komencos studadon en la fama universitato de Leiden.

La somerajn monatojn inter du periodoj de streĉa studado ŝi dediĉis kun granda plezuro al kontakto kun samaĝuloj el ĉiaj medioj. La unua kontakto okazis la 30-an de junio, kiam ŝi renkontis en Amsterdam reprezentantojn de studentaj, sportaj, junulaj kaj artistaj organizaĵoj. En la domo kaj ĝardeno de la urbestro okazis gaja neformala „promenanta” lunĉo, en la urbo okazis sportfesto kaj en la Urba Muzeo la kronprincino konatiĝis kun la estraro de la Kunlaborantaj Artaj Institucioj, de kiu organizaĵo ŝi akceptis kun entuziasmo la Patronecon.

Ĉio ĉi inspiris la estraron de la nederlanda Esperanto-Asocio „LEEN” al bonega ideo: donaci al princino Beatrix okaze de ŝia unua pli persona konatiĝo kun la nederlanda junularo la belegan imponan bildlibron en Esperanto „Nederlando”, en la nomo de la nederlanda junularo esperantista.

Mirinde facile estis pere de la amsterdama urbestro ricevi la permeson por tio. Evidente, la originala kaj ĝentila gesto plaĉis al la aŭtoritatuloj. La juna

ĉarma sekretarino de „LEEN”, F-ino H. C. van der Beek, ricevis inviton ĉeesti la lunĉon, la urbestro persone prezentis ŝin al la kronprincino kaj en ĉeesto de aŭtoritatuloj kaj ĉiaj reprezentantoj de la nederlanda junularo F-ino van der Beek transdonis la libron kun taŭga paroladeto. Kun la princino ŝi trafoliumis la libron kaj intertempe havis okazon doni multajn informojn pri Esperanto, pri la Petskribo, pri la UNESKO-Rezolucio, pri la instruado de Esperanto en la amsterdama universitato, pri la lingvo mem kaj ĝia klara gramatiko ktp. Ĉiuj aŭskultis kun granda atento. La princino esprimis koran dankon pro la donaco kaj diris, ke ŝi vidis la nederlandlingvan originalon de la libro nur en montrufenestroj, sed ankoraŭ ne konas la enhavon kaj ŝi aldonis, ke ŝi „faros sian eblon” kompreni la Esperanto-tekston. Tiucele akompanis la libron nederlanda eldono de la trafa libreto de Setälä La Vojmontrilo (De Wegwijzer). Fine, la urbestro demandis al F-ino van der Beek kio estas „ĉerizoj” en Esperanto kaj li proponis, kune „manĝi ĉerizojn” en la ĝardeno. Tie, dum senĝena babilado kun la princino kaj kun multaj aliaj, F-ino van der Beek havis okazon ankoraŭ multon rakonti pri Esperanto.

Estas neeble taksii la valoron de tiu ĉi okazaĵo por Esperanto. Junaj homoj el medioj kien ĝenerale ni malfacile enpenetras, aŭdis pri Esperanto kiel atentinda afero, konstatis ke seriozaj personoj kaj instancoj okupiĝas pri ĝi, vidis, kiaj belegaj verkoj estas eldonitaj en la Internacia Lingvo. Bonvolo estis kreita per digna donaco digne prezentita en digna momento. Skribis pri la okazaĵo la tuta nederlanda gazetaro.

M. H. V.

MEMORE DE LA UNUA KUNVENO DE LA SICILIAJ ESPERANTISTOJ — CATANIA 1951—1956 —

La 26-an de majo la Esperanto-Grupo de Catania memorigis la 1-an Kunvenon de la Siciliaj Esperantistoj organizitan de Adv. Jozefo Stanislaw Boscarino, Delegito de la Itala Esperanto-Federacio por Sicilio, la 26-an de majo 1951. Tiam en Catania kaj en la apuda urbo Acirezza kunvenis Siciliaj esperantistoj por interkonsenti pri la revigligo de la movado en Sicilio.

Ĉeestis, kiel honoraj gastoj, Prof. Giorgio Canuto kaj D-ro Borione, respektive Prezidanto kaj Sekretario de I.E.F., kiuj donis valorajn konsilojn kaj sugestojn. Prof. Canuto ankaŭ brile paroladis en la urba Universitato.

Sekve de la kunveno oni refondis grupojn en Sicilio, kies unua estis la Grupo de Catania, kaj ĝia iniciatinto, Adv. Boscarino, fariĝis honora Prezidanto.

La Estraro de la Grupo de Catania, memore de la okazintaĵo, nomis Prof-on Giorgio Canuto kaj D-ron Carlo Borione Honoraj Membroj de la Grupo, kaj la Generala Asembleo, kunvokita la 29-an de majo, sub prezido de Adv. Boscarino, aklame aprobis la honorigon de la du eminentaj estraranoj del la nacia movado.

Al Prof. Canuto kaj al D-ro Borione omaĝe estis donacita memorigan pergamemon subskribitan de la grupa estraro kaj de Adv. Boscarino, organizinto de la kunveno.

Esperantista Vivo

Naskiĝoj

Forné. Al ges-anoj J. Juan Forné, Marti 3, Valencia, Hispanujo, je la 24a de junio 1956 naskiĝis dua filo **Francisko Maertens-Mallet**. La 8an de junio 1956 naskiĝis al ges-anoj G. **Maertens-Mallet**, Prins Leopoldstraat 51, St.-Kruis (Brugge), Belgujo, filo **Frank**, frato por Dirk, Johan kaj Guido.

Nekrologo

Hoope. Le 11-an de junio 1956 mortis en Leiden, en aĝo de 73 jaroj, s-ano P. J. **Hoope**, prezidanto de la societo P.A.C.E.N. kaj delegito de U.E.A.

Moser. La 14an de majo 1956 mortis en Zürich post mallonga malsano s-ano **Samy Moser**, dum pli ol 30 jaroj unu el la plej aktivaj membroj de la loka societo.

Ragnell. La 26an de junio 1956 mortis 79-jara s-ino **Hanna Ragnell**, verŝajne la sola dumviva membro de U.E.A. en Finnlando. Sub verkista nomo **Hanna Rauto** ŝi aperigis pli ol dek librojn.

Wohlthat. Mortis en majo en la aĝo de 92 jaroj nia membro Prof. **D-ro A. Wohlthat**, Germanujo, kiu dum multaj jaroj vigle okupiĝis pri Esperanto.

El la esperanto-movado en Polujo

En julio aperis numero de la monata ilustrita gazeto „Pollando” ankaŭ en Esperanto. Kutime tiu ĉi belega kaj varia gazeto aperas en ses lingvoj: pola, angla, franca, germana, hispana, rusa. Estas necese, ke esperantistaj societoj kaj individuaj esperantistoj okupiĝu pri tiu ĉi afero, propagandu kaj rekomendu la gazeton. Se la eksperimento sukcesos tiam verŝajne ankaŭ aliaj numeroj aperos en Esperanto. Ni notu, ke en ĉiuj eldonoj aperis artikolo de S-ro Dratwer: „Pollando — patrujo de Esperanto”. Car la eldonnombro en ĉiuj lingvoj superos cent mil ekzemplerojn, do la propaganda signifo de tiu ĉi artikolo estas tre grava. Ciam pli kreskas favora sintenado de

la gazetaro kaj radio. Laŭ iniciato de Pola Radio la Asocion vizitis ĝia raportanto per la radiaŭtomobilo por intervjuo pri Esperanto. Intervjuita estis s-ano I. Dratwer, ĝenerala sekretario de la Asocio. La intervjuon oni elsendis la 17-an de majo vespere en la „Muziko kaj aktualaĵoj” kaj ĝi estis ripetita la 18-an antaŭtagmeze.

Anstataŭ mortinta prezidanto de la Asocio s-ano Edward *Bugajski*, kiel prezidanto estas elektita antaŭa vicprezidanto s-ano *Andreo Rajski*; kiel vicprezidanto estas elektita s-ano *Johano Zawada*. Kiel ĝenerala sekretario plu funkcias la subskribinto.

Isaj Dratwer, Varsovio

pruvon, ke la menciita formo certe ne estas nenormala; kontraŭe: ĝi estas regula kaj logika. Tamen mi ankoraŭ ne trovas ĉi tiun formon konsilinda por popola instruo; ni ne forgesu ke tiaj formoj tamen senpere iam viviĝos kaj rajtiĝos.

H. F. van Denzen

Mi petas vin transdoni mian dankon al ĉiuj, kiuj skribis al mi aŭ al la Revuo Internacia pri mia artikolo. Mi nur rimarkigas, ke ne estas primirinde, ke la formo jam troviĝis okaze, ĉar, kiel mi diris, mi ne inventis ĝin sed nur formis ĝin laŭ la reguloj. Mi vidas kun plezuro, ke samideano Reto Rossetti uzas ĝin en la sama numero de la Revuo (p. 102: „Estintus utile listigi la vortojn, ktp.”) Mia intenco estis popularigi la formon, kaj pro tio mi tute ne postulas aŭtorrajton.

F. I. Wiener, L.B.E.A.

PLUA PROGRESO EN HUNGARLANDO

La V-an Sudhungarlandan Esperanto-Konferencon partoprenis 120 el 13 lokoj, inter ili 14 el Budapeŝt.

Gimnazia profesoro dr. Jozefo *Kondor* en Vasvár ricevis okaze de la landa pedagoga taĝo la oran medalon de la Landa Packonsilantaro pro lia bonega porpaca agado per Esperanto. Stefano *Egervári*, membro de la Landa Esperanto Konsilantaro ricevis pro bona faklaboro ŝtatan dekoracion pro sukcesa konstruo de la socialismo.

En la V-a distrikta Kulturhejmo, Budapeŝt, la esperanto-fakrondo membris la 17-an de majo pri „La Taĝo de la Bonvolo”. Pacsaluto de la kimraj infanoj estis laŭlegita de f-ino *Palma May*. La 24-an *P. Balkányi* parolis pri la vivo de *Ibsen* kaj legis partojn el *Peer Gynt*. Oni sendis komunan saluton al Norvega Esp. Ligo. La 7-an de junio s-ano *T. Ujlaki-Nagy* legis pri *Hristo Botév* kaj oni sendis saluton al la Bulgara E. Asocio. La 21-an de junio veterano, dro. *Karlo Mezei*, esp-isto de 1905, eble plej malnova en la lando, parolis pri *La longa homvivo*. La tekston por laŭlegi oni volonte sendos interŝanĝe.

Nia Forumo

Se mi sciintus...

La artikolo „Se mi sciintus, ke vi venos” sufokis min. Mi protestas kaj malaprobas.

Roland Jossinet

Mi tute malaprobas ĉi tiun monstraĵon. „Reformuloj” kaj „plibonigantoj” donis al la movado kripligan baton en 1908. Ni gardu, ke tio ne okazu denove. **R. Paul**

Kun vera ĝojo mi legis la artikolon de s-ano *F. I. Wiener*. Mi scias delonge, ke tian formon iu jam proponis, sed neniel estas al mi kompreneble, kial ĝi ankoraŭ ne estas oficiala. Mi ne dubas, ke la tuta esperantistaro bonvenigos ĝin aklande, antaŭ ĉio la kursgvidantoj. Ĝiaj oficialigo kaj enkonduko donos al la lingvo novan eblecon fariĝi pli fleksebla kaj eleganta. (Bedaŭrinde, ke ĝuste la ekzemplo elektita de s-ano *Wiener* ne estas la plej belsona.) Mi persone ĝojas precipe tial, ke mi ne plu bezonos diri: „se mi estus estinta”. Do: saluton al vi, -intus-formoj!

Eduard V. Tvarozek

Mi volas nur komuniki al vi, ke unu el miaj lernantoj (17-jara lertulo) post kelkmonata studo memstare kunmetis la frazon „Mi certe parolintus...” kaj ankaŭ ĝuste klarigis ĝin. Mi citas tion kiel

MALPROPAGANDO

Sendube, la korespondado prezentas por la komencantoj — precipe por la ĝejnuloj — la plej grandan ĝuon en la lernado de Esperanto. La korespondado donas al ili fortan instigon daŭrigi la lernadon kaj samtempe ĝi allogas la aliajn fari tion. Bedaŭrinde tiuj unuaj paŝoj de la komencantoj en la praktika uzado de nia lingvo ofte prezentas al ili grandan disreŝiĝon. Kelkaj miaj gelnantoj plendis, ke la anoncintoj ne respondas spite de la indiko: „Respondo garantiata”. Ankaŭ mi mem spertis tion. Ĉi-foje mi ne volas citi la adresojn de la nerespondintoj.

Estus dezirinde, ke la administrego en ĉiu numero avertu la anoncintojn, ke ilia devo estas almenaŭ unufoje respondi al ĉiu korespondanto. Samtempe ĝi invitu la korespondantojn, se ili post iu tempo ne ricevis respondon, informi pri tio la Centran Oficejon de UEA. Kompreneble tiuj plendoj devus okazi post sufiĉe longa, logika tempo. Ekzemple, rilate la korespondadon kun samkontinentaj landoj, 1—2 kaj kun la transmaraj landoj 3—4 monatoj. Ĉe la aeroŝtataj sendaĵoj tiuj limtempoj devus esti je duono pli mallongaj.

St. V. Stojnic

LA INTERNACIAJ KONKURSOJ 1956

Stato je la 30-a de junio

Konkurso I

Lando	Kvoto	Poentoj	%
1. Jugoslavio	2629	3322	126,36
2. Italujo	3025	3310	109,42
3. Hispanujo	1825	1815	99,45
4. Nederlando	5074	4894	96,45
5. Svedujo	6893	6640	96,33
6. Francujo	5869	5607	95,54
7. Svislando	1740	1650	94,83
8. Britujo	7608	7143	93,89
9. Finnlando	2872	2660	92,62
10. Belgujo	2135	1880	88,06
11. Brazilo	6820	4440	65,10
12. Danlando	2765	1785	64,56
13. Usono	3352	1985	59,22

14. Norvegujo	2318	1365	58,89
15. Germanujo	6986	3930	56,26

Konkurso II

Lando	Kvoto	Poentoj	%
1. Kanado	345	490	142,03
2. Islando	330	380	115,15
3. Portugalujo	495	570	115,15
4. Maroko	937	1061	113,23
5. Urugvajo	330	315	95,45
6. Aŭstralio	1145	1025	89,52
7. Japanujo	1182	1030	87,14
8. Izraelo	330	280	84,85
9. Sudafriko	305	210	68,85
10. Aŭstrujo	1485	950	63,97
11. Nov-Zelando	854	515	60,30
12. Meksiko	250	120	48,—
13. Irlando	250	55	22,—

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

EENDRACHTSWEG 7 ROTTERDAM C. NEDERLANDO

OFICIALA INFORMILO

La 1an de aŭgusto 1956

N-ro. 285

STATISTIKO. Jen la stato de la membraro je la fino de julio kaj ankaŭ por komparo, je la fino de julio 1955:

	1955	1956
Asociaj membroj	5638	11189
Individuaj membroj		
MJ	888	863
MA	3842	4198
MS	796	714
Pat.	9	9
DM	289	291
HM	57	54
	11519	6129
		17318

DELEGITOJ.

Aŭstrujo.
St. Veit a/Triesting (Niederösterreich) D. S-ino A. Tempus-Listner, eks-instruistino, Fabrikstrasse 20.

Belgujo.
Gent (Oostvlaanderen) D.: Vakas.
FD: (Scienca Literaturo): Vakas.
Nieuwpoort (West-Vlaanderen) D.: Vakas.

Overpelt (Limburg) D.: Vakas.
FD.: (Katolikaj aferoj): Vakas.

Brazilo.
Ihêus (Baia) D.: Vakas.
Rio de Janeiro (D.F.) FD. (Religioj) S-ro Carlos Torres Pastorino, Profesoro kaj ĵurnalisto, Rua Sete de Setembro no. 223, ap. 401 e 802 (Centro).

Sao Miguel Paulista (Sao Paulo) D.: Vakas.
Uniao da Vitória (Paraná) D.: Vakas.

Britujo.
Bridgnorth (Shropshire) FD. (Kolektivaj Kolonioj) S-ro Derrick P. Faux, Ĵurnalisto, Wheathill Bruderhof, Bromdon.

Chalfont St. Giles (Buckinghamshire) F.D. (Instruado) S-ro Johano Beresford, studento, Newland Park College

Bulgarujo.
Kolarovgrad FD. (Transporto) S-ro Hristo Tonev, Ŝtatoficisto, strato „Panajot Volov” no. 32.

Sofia FD. (Literaturo) S-ro Metodi Pančev, Laboristo, str. Persenk 30, Sofia 7.

Ceĥoslovakujo.
Bratislava (Slovensko) D. S-ro Alexander Csáder, Librotenisto, Zámocnícka ul. 8/I.

Brno (Moravio) FD. (Sociaj aferoj) S-ro Josef Ambroz, Oficisto, Spačková 3, Brno — Zidenice.

Kutná Hora (Bohemio) D. S-ro Josef Kozeny, Profesoro, Stalinova 197.

Pardubice (Bohemio) FD. (Filatelo) S-ro Karel Franc, Teknika oficisto, Dukla 2287.

FD. (Turismo) S-ro Jaromír Štechr, Konstruisto, Pernerova 1574.

Podebrady (CSR) D. S-ro František Pytloun, Fervoĵoficisto emerita, Jungmannova 29/I.

Rokytnice v Orlických horách (Ĉeĥy Hradec Králové) D. S-ro Václav Černý, Instruisto, Rokytnice v Orlických horách 87.

Zlonice FD. (Ŝakludo) D-ro Václav Faigl, Oficisto, Zlonice no. 6.

Finnlando.
Helsinki (Töööl) VD. S-ro Kaarlo Jokinen, Kontoristo, Töööllentullinkatu 7. A. 2.

FD.: (Sportoj): La VD.
Lappeenranta (Kymen lääni) VD.: Vakas.

Tampere (Pispala), (Hämeen lääni) VD. S-ro Harri Heimonen, Instruisto, Pispala Harju 3.

Francoj.
Aix-en-Provence (Bouches du Rhône) D. S-ro Henri Malinvaud, Notario, 15 rue du 4 septembre.

Bouchemaine (Maine et Loire) D. S-ro Raymond Panchèvre, Metaltornisto, Bouchemaine.

Dijon (Côte d'Or) FD. (Asekuro) F-ino Magdeleine Lepinte, Sekretarino en asekuroficejo, Rue des Perrières no. 22.

Germanujo.
Hamburg FD. (Ĵuro): S-ro Walter Lippmann, Advokato, Grillparzerstr. 4 I.

Heide (Dithmarschen) D. S-ro Berthold Fischer, Dipl. akordion-instruisto, fak-instruisto por tajpado kaj stenografio, Ostvoher Weg 2, (24b) Heide.

Werl Krs. Soest (Westfalen) D. S-ro Werner Flick, Miksisto, Poŝfako 180, Walburgisstr. 46 II.
FD (Filatelo): La D.

Irano.
Tehran-Iran D. D-ro Parviz Zolejn, Membro de extra-ministrejo, Str. Zomorod (ĉe Boat-Club), Tehran 17.

Izraelo.

Kirjat Jam (Cafon) D. S-ro Ota Ginz, Shd. Szold 11, Kirjat Jam Bet.

Maroko

Port Lyautey FD. (Instruado): S-ro N. Van Dat, Profesoro de fiziko, Immeuble de la D.I.P., Avenue Foch.

Nederlando.

Ijmuiden (Noord-Holland) D. S-ro S. van Gils, Korpa Edukisto, De Noostraat 155.

FD. (Korpa Edukado): La D.

Norvegujo.

Halden (Østfold) VD. S-ino Gudrun Høibo, Genealogo, Dommastrino, Knardalveien 28 (Poŝtadreso: Boks 104, Halden).

Nov-Zelando.

Trentham (Wellington) D.: Vakas.

Pollando.

Gdansk-Wrzeszcz (Pomorze) FD. (Biologio, kemio), S-ro Józef Toczyski, Mezlerneja instruisto, Ul. Grunwaldzka 6 m.3.

Gdynia (Wybrzeze) D.: Vakas.
Kraków FD. (Esp.-instruado): Prof. Mieczysław Sygnarski, Lektoro de Esp. en Jagiellona Universitato, Bol. Prusa 4 m. 23.

Poznan FD. (Popola folkloro): S-ro Józef Mielcarek, Oficisto, Mostowa 14 a/37.

FD. (Turismo): S-ro Borys Wierzejewski, Planisto, Ul. Klonowicza 6 m 5.

Torun D. S-ro Jacek Piatkowski Bibliografisto, ul. Konopnickiej 20 m. 5.
FD. (Astronomio): S-ro Henryk Witkowski, Oficisto, ul. Jeczmienna 3 m. 1.

Sarlando.

Bildstock D.: Vakas.
Ottenhausen-Neu-Aschbach D. S-ro Jakob Schenkel, Inĝeniero, Am Ziegelhof 30.

Sud-Afriko.

Amersfoort (Transvaal) D. S-ro Jan Heres, Buĉisto, P.O. Box 32, Scheiding Street.

Johannesburg (Transvaal) VD. S-ro Thomas Charles Hawley, Sekurecoficisto, P. Kesto 1167.

Pretoria (Transvaal) D. S-ro Gerrit Bekink, Scientologo, P.O. Box 144, Pretoria North.

FD. (Scientologio): La D.

Svedujo.

Höör (Skane) D. S-ro Nils Olsson, Librovendisto, Norra Torggat 20 (Labborejo: Järnvägsgat. 4).

Stockholm D. S-ino Solveig Carrfors, Storskogsvägen 12, Bromma.

Usono.

Desert Springs (California) D.: Vakas.

Kaweah (California) D.: Vakas.

FD. (Filologio): Vakas.

Seattle (Washington): VD. S-ro Vincent A. Griffith, Civila kontisto, armea fako, Usona registaro, 8556 - 37th Avenue S.W., Seattle 6.
 Toledo (Ohio) D. S-ro Harry S. Blaine, Poŝtoficejo, 3809 Monroe Strato.
 FD. (historio kaj kolektado de antikvaj horloĝoj kaj poŝthorloĝoj): La D.

MEMBRO-SUBTENANTOJ 1956

612. Møller, F-ino Ellen, Faborg, Danlando.
 613. Bador, F-ino Yvonne, Tarbes, Francujo.
 614. Dessapt, S-ro Marius, Thiers, Francujo.
 615. Bepperling, S-ino Anneliese, Wetzlar, Germanujo.
 616. Berger, S-ro J. G., München, Germanujo.
 617. Klünder, S-ro Willi, Burgsteinfurt, Germanujo.
 618. Leipold, S-ro M., Weiden, Germanujo.
 619. Michling, S-ro Ing. Horst, Göttingen, Germanujo.
 620. Rosenträger, S-ro Hans, Dortmund, Germanujo.
 621. Siffrin, S-ro Hans, Stolberg, Germanujo.
 622. Stoffers, S-ro Robert, Bremerhaven, Germanujo.
 623. Thalmaier, S-ro Ludwig, Gräfelfing, Germanujo.
 624. Pacelli, S-ro Prof. Giuseppe, Pisa, Italujo.
 625. Symoens, S-ro Edward, Leopoldstad, Kongo Belga.
 626. Achilli, S-ro Paul, Mazagan, Maroko.
 627. Bat, S-ro, Meknès, Maroko.
 628. Forté, S-ro Antoine, Jerada, Maroko.
 629. Hug, S-ro Raymond, Casablanca, Maroko.
 630. Moutet, F-ino Colette, Port Lyautey, Maroko.
 631. Pernet, F-ino Jacqueline, Marrakech, Maroko.
 632. Wierkx, S-ro G., Rotterdam, Nederlando.
 633. Holloway, S-ro J. F., Trentham, Nov-Zelando.
 634. Moore, S-ro V. R., Upper Hutt, Nov-Zelando.
 635. Raynor, S-ro G. D., Wellington, Nov-Zelando.
 636. Drunen, S-ro A. van, Kaapstad, Sud-Afriko.
 637. Carrfors, S-ino Solvieg, Bromma, Svedujo.
 638. Linnander, F-ino Siri, Stockholm, Svedujo.
 639. Olsson, F-ino Agada, Göteborg, Svedujo.
 640. Tell, S-ro Leander, Norrköping, Svedujo.
 641. Sandmeier, S-ro H., Zurich, Svislando.
 642. Sennhauser, Schwester A., Bern, Svislando.
 643. Cao, S-ro V. L., Montevideo, Urugvajo.
 644. Culbert, S-ro Sidney S., Washington, Usono.

645. Eitner, S-ro Alex, Cleveland, Usono.
 646. Moline, F-ino Ruth L., Tacoma, Usono.
 647. Sayers, S-ino Eda T., Lillie, Usono.
 648. Sayers, S-ro James D., Lillie, Usono.
 649. Solzbacher, D-ro William, Washington, Usono.
 650. Corral, S-ro Angel, Buenos Aires, Argentino.
 651. Milkuschutz, S-ro J. C., Buenos Aires, Argentino.
 652. Mot, dro. René De, Uccle-Bruxelles, Belgujo.

653. Allen, S-ro F. C., Newport, Britujo.
 654. Laurie, S-ino W., Bournemouth, Britujo.
 655. Vasiljef, S-ro L., København, Danujo.
 656. Delaire, S-ro Pierre, Orleans, Francujo.
 657. Mila, S-ro E., Drancy, Francujo.
 658. Böhmke, S-ro Paul, Wiesbaden, Germanujo.
 659. Dresselhaus, S-ro Heinrich, Schloss Holte, Germanujo.
 660. Köhne, S-ro Heini, Göttingen, Germanujo.

RADIO

Dimanĉo

14.00-14.15

Ciujn informojn pri radio sendu al S-ro G. Larglantier, 29 Bd. Murat, PARIS 16, Francujo.

En la tabelo horoj de la dissendoj estas laŭ la horsistemo de Greenwich. Por Mez-Eŭropa tempo oni aldonu unu horon.

Mallongigoj: I = Informoj, P = Parolado, K = Kurso.

Lundo

12.30-13.00

Piraĉununga, 198m. K. Rádio-Difusora ZYI 3, Piraĉununga (São Paulo), Brazilo.

23.20-23.35

Bilbao, 265m. P. Radio Bilbao, Hispanujo.

12.30-13.00

La Coruña, 250m P.K. Radio Juventud, Real 71, La Coruña, Hispanujo.

22.40-22.57

Hilversum, 298 m, 188 m, P. N.C.R.V., Schuttersweg 8, Hilversum, Nederlando (nur la unuan lundon de ĉiu monato).

Mardo

00.45-01.00

San José, 192m P. Radio Welcome CW47A, San José, Urugvajo.

11.55-12.00

Bern, 48.66m, 31.46m, 13.94m, P. D-ro Baur. SRG, Kurzwellendienst, Neuengasse, 23, Bern, Svislando.

15.00-15.10

Ljubljana, 327m, 221m. K. Radio Ljubljana, Jugoslavujo.

17.35-17.40

Bern, 48.66m, 31.46m, 13.94m, P. D-ro Baur.

19.00-19.15

Stockholm, 26.10 m, 19.90 m, P. Radio I.B.R.A., Esperanto programo. Poŝtfako 822, Stockholm 1, Svedujo (nur la lastan mardon de ĉiu monato).

19.15-19.30

Carlet, 288m. I. Radio Carlet (Valencia), Hispanujo.

Merkredo

16.00-16.10

Caramulo, 205m. I. Rádio Polo Norte, Caramulo, Portugalujo.

17.55-18.10

Roma, 41.24 m, 30.90 m, 25.40 m. P. S-ro Minnaja, Radio Roma, Casella postale 320, Roma, Italujo.

21.55-22.05

Wien, 208m, 48.74m, 25.46m. I. Radio Wien, Argentinlerstr. 30a, Wien IV, Aŭstrujo.

22.15-22.20

Hilversum, 402 m. I. V.A.R.A., Heuvellaan 33, Hilversum, Nederlando.

Ĵaŭdo

06.45-06.50

Perpignan, 202m. K. Radio Perpignan-Roussillon, Perpignan (Pyr. Or), Francujo.

08.30-08.45

Paris, 348m, 249m. K. Esperanto-Office, Orléans (Loiret), Francujo.

11.55-12.00

Bern, Kiel marde P. D-ro Privat.

17.35-17.40

Bern, Kiel marde P. D-ro Privat.

22.30-23.00

Valencia, 200m. I.K. Radio Alerta, Colón 11, Valencia, Hispanujo.

22.45-23.00

Zagreb, 264m. I. Radio-Zagreb, Jugoslavujo.

23.30-24.00

São Paulo, 62.83m, I.K. Rádio Progresso, São Paulo, Brazilo.

Vendredo

00.45-01.00

San José, Kiel marde.

17.55-18.10

Roma, Kiel merkredo, P. D-ro Musella.

19.15-19.30

Carlet, Kiel marde.

21.30-21.45

Guatemala Cd. 470m, 197m, 47m, 30.50m. I. Radio-Esperanto, La Voz de Guatemala, Mez-Ameriko.

Sabato

11.05-11.30

Rio de Janeiro, 214m. K. Rádio Roquete Pinto PRD5, Rio de Janeiro (D.F.), Brazilo.

17.30-18.00

Rio de Janeiro, 375m, 30.70m, 25.10m, 16.80m. K.I. Rádio Ministério da Educação, Praça da República 141A, Rio de Janeiro (D.F.), Brazilo.

18.45-19.00

Barcelona, 360m. I.K. Radio Unión, Emisora del Frente de Juventudes, Barcelona, Hispanujo.

22.15-22.22

Hilversum, 298 m, 188 m. P. K.R.O., Emmastraat 52, Hilversum, Nederlando.

661. Schäfer, Sro Albert, Dortmund, Germanujo.
 662. Wingen, Sro Wilhelm, Köln-Sülz, Germanujo.
 663. Träär, Sro Drago, Dol-Logatec, Jugoslavio.
 664. Zunko, Sro Inĝ. Oto, Pula, Jugoslavio.
 665. Knol, Sr G. T., Coevorden, Nederlando.
 666. Armanis, Sro A., Sorsdahl, Norvegujo.

DONACIOJ AL LA GENERALA

KASO:

F. Laurie, Britujo, 8,89 gld.; Pastro Emmanuel, Turkujo, 1,12 gld.; R. Barta, Usono, 3,80 gld.

DONACIOJ AL A.P.O.:

North. Counties Training College, Britujo, 8,52 gld.; C. M., Buenos Aires, 15.— gld.

Al ĉiuj donacintoj koran dankon.

ĈEF-DELEGITOJ KAJ PERANTOJ!

Bonvolu atenti ke la kotizo-MJ por 1957 estas fiksita je duono de la kotizo-MA (5 n.gld.) Kotizo por Patrono estos dekobla MA-kotizo. La aliaj kotizoj restas sensanĝaj.

DONACO AL FONDAĴO- EKSPOZICIO:

P. Williams, Nov-Zelando, 2,66 gld.

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ:

Padua, S-ro Geraldo A. Gomes de, Rio de Janeiro, Brazilo, Shimatai, S-ro Seiichi, Sao Paulo, Brazilo.

KOREKTO

Ni atentigas ke en la jarlibro kiel ĉefdelegito por Italujo estas indikita S-ro E. Aprosio.

La tiea ĉefdelegito estas kiel antaŭe S-ro L. Minnaja, Viale Giulio Cesare 223, Roma, Italujo.

REKLAMOJ JARLIBRO 1957

Ni varme rekomendas al ĉiuj aktivuloj denove verbi grandskale reklamojn por la Jarlibro.

Evidentiĝis necese, plialtigi la prezon de tiuj reklamoj, kiuj ĝis nun estis tre kaj tro malaltaj.

Bonvolu bone noti la jenajn novajn tarifojn: 1 paĝo 64 n. gld.
 $\frac{1}{2}$ paĝo 32 n. gld.
 $\frac{1}{4}$ paĝo 16 n. gld.

Pro la grandega vasteco de la reklamoj, kiuj estas legataj en 80 landoj — efiko apenaŭ atingebla per iu ajn

alia eldonajo — el komerca vidpunkto tiuj prezoj ankoraŭ estas tre modestaj.

MARSEILLE 3—10 AŬG. 1957

Bedaŭrinde, miskompreno kaŭzis konfuzon pri la datoj de la 42-a Universala Kongreso en Marseille.

En Kopenhago estis definitive decidite ke la proksima U.K. okazos de la 3-a ĝis la 10-a de aŭgusto 1957 en Marseille.

M. H. Vermaas,
Administranto.

DANKON!

Ĉar multaj kongresanoj gratulis al mi pro la Universala Ekspozicio, kolektita de C.E.D. kaj unufoje elmontrita en Montevideo, mi deziras sciigi, ke la arkitektoj Bodil kaj Bent Foerlev kaj la desegnisto Børge Hamberg, kiuj projektis la elmontradon en Kopenhago, senpage planis ĉion. Samtempe mi deziras danki ne nur al ĉiuj helpantoj kaj kunlaborantoj de la Kopenhagaj kluboj, kiuj laboris por konstrui la ekspozicion aŭ deĵoris en ĝi, sed ankaŭ al ĉiuj esperantistoj, kiuj sendis kompletigan materialon al la ekspozicio. Al la kunlaborantoj la dankon kaj honoron.

ESKIL SVANE,
Prezidanto de la Loka Ekspozicia Komitato en Kopenhago.

ANONCETOJ

Koresponda Servo Mondskala havigas korespondantojn el pli el 30 landoj laŭdezire. Skribu, indikante vian aĝon kaj aldonante respondkuponon, al: Daniel Luez, Boulevard Brosolette, LAON (Aisne), Francujo. Naciaj Esperantogazetoj bonvolu afable represi tiun ĉi anoncon.

La Nova Kristaneco, bazita je la doktrino de sveda sciencisto kaj reformanto Em. Swedenborg, enportas certan lumon en la homan animon pri la postmorta vivo kaj pri vera religio bazita je la Biblio kaj ĝia interna senco. Ĝi akordigas la religion kun la scienco. Postulu traktaĵojn senpage. Aldonu, se eble, resp. kuponon. Adresu: Jan. B. Vlach, Luzická 21, Praha XII, Ĉeĥoslovakujo.

Rosaria Esperanto Asocio ricevis centojn da korespondadoj pro sia anonco en Esperanto decembra numero. Estas neeble respondi al ĉiuj. Ni tutkore dankas la helpon.

Mi kolektas poŝtmarkojn pri floroj, bestoj kaj fervojaj aferoj, F.D.-kovertoj k.t.p. Serĉas kontakton kun filatelistoj en la tuta mondo. Skribu viajn interesojn. Certe respondos S-ro Z. J. Buurkes, Lex Althoffstraat 5 I, Amsterdam-W, Nederlando.

Firmo Simone Pastorino — Ŝuejo (ĉiaj ŝuoj por laboristoj). Via Don Minzoni, 13, CAMPOLIURE, Italujo.

Ses kursaninoj deziras tutmonde korespondi. F-ino R. Correy, 20 Rue Bersot, Besançon, Francujo.

Elementa lernejo deziras interŝanĝi knabajn desegnaĵojn kun ĉiulandaj lernejoj. Skribu al S-ro Nagara Ŝogakkō, Ootū-si, Siga-ken, Japanujo.

El la tutmondo, deziras korespondi por interŝanĝi poŝtmarkojn. Ĉiam respondas! S-ro Peron Pierre, Pavillon 1, Sana d'Helfaut, par Wizernes (Pas-de-Calais), Francujo.

Mi kolektas poŝtmarkojn kun bildo de bestoj, kaj sur tia bazo deziras interŝanĝi. Alessandro De Bernardi, Boli-via 1365, Montevideo, Urugvajo.

Mi deziras korespondi kun gesamideanoj tutmonde je arkitekturo, pentraĵo kaj skulpturo. Ing. Arch. Antoni Ulinski, Golebia 3, Kroków, Pollando.

Gekursanoj deziras korespondi kun ĉiulandanoj. Skribu al S-ro Masao Ossaka (delegito de U.E.A.), Kamibamba-tyo, Ootū, Siga-ken, Japanujo.

28 jara librotenisto deziras korespondi (ankaŭ interstene) tutmonde pri diversaj temoj. S-ro Jerzy Mazys, Warszawa 12, ul. Wiktorska 83/87-33, Pollando.

Esperantista Grupeto deziras korespondi tutmonde kaj interŝanĝi bildkartojn. Nepre respondo. S-ro Hermann Pape, Lüneburger Str. 78, Soltau (Han), Germanujo.

Nur interstene, pri gravaj aferoj, nur en lingvoj franca kaj portugala, korespondas Gilbert Ledon, rua Bento Martins 371, Pelotas (R.G.do.S.) Brazilo.

22-a jara studento deziras korespondi tutmonde, speciale kun inoj, kaj interŝanĝi, poŝtkartojn. Álvaro Rabelo, Rua Pernambuco, 513, Belo Horizonte, Minas Gerais, Brazilo.

Kaktacoj! La nova rondo „Amikoj de Kaktaj” vokas kaj invitas ĉiujn interesojn al partopreno. Kolektantoj-kultivantoj amatoraj de sukoloj kaj kaktaj, jen estas nova agadkampo por kaj per Esperanto kaj ni petas vin kunlabori en tiu ĉi libera unuigo per la alsendo de: viaj adresoj, demandoj, specialaj intereso, rilataj artikoloj komuninteresaj k.t.p. por nia bulteno. La celo estas reciproka helpo per: korespondado, interŝanĝo de semoj, plantetoj, spertoj, konsiloj, mendejoj, literaturindikoj k.c. kaj samtempe apliki Esperanton praktike kaj utile en plia kampo de l'homa vivo. Provizore komisiito B. R. Zeiner, 26 Cannon st., BARRY, Glam, Britujo.

Junulo 23-jara deziras korespondi kun nederlanda knabino. Vazil G. Draganov, Brakniča, Popozko, Bulgarujo.

Ripetita peto. Infandesegnaĵojn kaj pentraĵojn por ekspozicio de Esperanto. Aĝo 6—14 jaraj. Oni ne permesis la instruadon de Esperanto en nia lernejo. Bonvolu sendi materialon por dokumenti. Vágó Imre, instruisto, Pecs, Rudas-utca 21, Hungarlando.

Bildkartojn kaj proverbojn ĉiulandajn, nacilingve kaj esperante, deziras: A. Macher, (17a) Münzesheim bei Bruchsal, Germanujo. Rekomplezon laŭdezire.

Samideanoj ĉie en la mondo, bonvolu transdoni al la Fremdultrafika Oficejo en via urbo nian peton, ke ĝi sendu al ni el siaj eldonitaj bildprospektoj unu specimenan ekzempleron. Ankaŭ vi mem bonvolu sendi. Poste ni sendos reciproke pri nia lando. Adreso: Fremdultrafika Oficejo Borsodmegyei Idegenforgalmi Hivatal, Miskolc, Hungarujo.

Kontraŭ ĉiu respondkupono mi sendos bildkarton el Usono per memorfest-poŝtmarko. Ĉiu bildkarto malsama al unu adreso. Petu iun ajn kvanton. Mendu grupe por via klubo, letervespero aŭ lernantoj. Aŭ ricevu tri bildkartojn **aerpoŝte** kontraŭ sep respondkuponoj. Rapi-deco! Adrian Hughes, Hillsboro, Oregon, Usono.

Fr. Tischer, Magdenburg-Buckau, Martinstr. 9, Germanujo, deziras korespondi kun seriozaj s-anoj nur el ekster-Eŭropo, propagandcele.

S.O.S. Estimataj Gesamideanoj! helpul sendante: afiŝojn, malnovajn gazetojn, librojn, bele afrankitajn leterojn, multkolorajn poŝtkartojn; mi ricevis permeson de la loka Cartia Komitato aranĝi en oktobro prelegon, ekspozicion kaj Esperanto-kurson, sed nun dependas ĉio de via solidareco karaj gesamideanoj. Varmantaŭdankon. Adr.: F. Slatynski, Smoluchowskiego 6/3, Oswiecim-Osiedle, Pollando.

Josip Vrančić, ĝis nun el Zagreb translokiĝis. Nova adreso: **DUBROVNIK**, Umjetnička galerija, Jugoslavio.

Raportisto-fotografisto, havanta fotojn kaj fotoseriojn, nigrajn kaj kolorajn, serĉas kunlaboradon en ĉiuj landoj kun gravaj revuoj. Skribu al **CHOPARD Michel**, 15 bis, rue du Canal; **SAINT-DENIS** (Seine).

Brazila junulo deziras korespondi k.ĉ.l. ĉiam respondos. Pedro J. Guimaraes, Muritiba, Bahia, Brazilo.

Nc multaj libroj aperintaj dum la lastaj jaroj havis tian sanigan influon al nia lingvo kiel „**Du Malsanoj en Esperanto**” de H. A. de Hoog. Tial ĉiu esperantisto

havanta lingvan ambicion kaj amon al Esperanto legu ĝin. Havebla rekte de la eldoninto aŭ de via nacia Esperanta eldono aŭ de la libroservo de U.E.A.

Filatelistoj! Anglalingva katalogo ilustrita pri hungaraj poŝtmarkoj. Prezo inkl. registritan afrankon: 1 M.A.-kotizo de U.E.A. Petu informojn de Pal Balkanyi, Pesthidegkút Haraszt u. 33, Budapest II, Hungarujo. Mendu kaj pagu pere de U.E.A., Eendrachtsweg 7, Rotterdam. Prezo sv. kronoj 4,40 inkl. sendkostojn. Erik Carlén, Hällabrottet, Svedujo, Poŝtĝiro 34 34 81.

Juna Ĉeĥoslovako deziras korespondi Esperante, angle, germane, pole, france kaj ruse kun gesamideanoj en la tuta mondo, kaj interŝanĝi diversajn objektojn. Jar. Bujas, O.-VITKOVICE, Salounova 35, Ĉeĥoslovakio. Certe respondas.

Turisma Prospekto en Esperanto pri Fécamp havebla. Skribu Esperantlingve al Essi, Fécamp (Seine-Maritime), Francujo.

Deziras korespondi: interŝanĝi revuojn, bele afrankitajn PI kaj leterojn deziras Rostislav PODEPREL, MERIN 224, Ĉeĥoslovakujo.

Korespondi kun tuta mondo deziras: František HORT, Malinovského 52, SLAPANICE U BRNA, Ĉeĥoslovakujo.

Fabelojn pri Niksoviroj (akvohomoj, akvoviroj, kaj similaj fabelaj estaĵoj) kaj ĉiaspecan etnografian materialon pri ĉu tiu temo kolektas Dr. Bohumila Sretrova, Jungmannova 9, PRAHA II. Sendata materialo kaj la korespondado krom en esperanto estas ankaŭ komprenebla en la lingvoj angla, franca, germana, hispana, itala, pola, rusa kaj ĉeĥa!

1906—1956. LA ROTTERDAMA ESPERANTO SOCIETO „MERKURIO” festos sian ORAN JUBILEON sabaton la 20-an de oktobro proks. Akcepto: de la 15.30—17.00 h. La Festprogramo komenciĝos je la 19.45 h., ambaŭ en la Beatrix-Salono. Groothandelsgebouw, Rotterdam. Gratuloj estos bonvenaj ĉu al la menciita salono ĉu al la sekretarioj: Willem Nagellaan 16, Rotterdam-N.

La Ora Jubileo de Krakova Esperantistaro (1906—1956) okazos la 15-an de decembro 1956. Ni nepre bezonas ekspozicio-esp. materialon kaj ankaŭ esp. gazetojn el tutmondo. Se eble ni rekomencos. Asocio de Esperantistoj en Pollando, Florińska 14, Kraków.

Kapablaj seriozaj reprezentantoj por biĵuterio, modaj artikloj kaj modaj butonoj, plastikaj, sanktaj artikloj ktp. en ĉiuj landoj serĉataj. Serĉas interrilatojn kun vendejoj de tiaj aĵoj, kiuj povas ricevi import-permeson. Bonvolu skribi al Erich Wilde, Schwäbisch-Gmünd (14a) Wttbg. Postfach 193, Germanujo.

Letervesperon aranĝos en la komenco de oktobro nova grupo en Usono. Ĉiu ricevos respondon. Skribu multnombre al: Sino James A. Parker, 515 — 25th St., Santa Monica, California, Usono.

Sekretario de Revuo „Problemoj de Lingvoscienco” — organo de akademia lingvistika instituto en Moskvo, bezonas ĉiajn periodaĵojn kaj deziras korespondi pri problemoj de naciaj lingvoj kaj internacia lingvo, pri la Esperanto-Movado kaj pri pacmovado en Esperanto. Bezonas Esp. literaturon kaj kronikon. Laŭeble kompensos per aliaj eldonaĵoj. V. P. Grigorjev, Metrostrojovskaja ul. 5 kv 43, Moskvo 34.

la nica literatura revuo

sub ĉefredaktoreco de
Prof. G. Waringhien
kun kunlaborado de
la plej famaj verkistoj
aperas ĉiun duan monaton
32/40 paĝa - - poŝformata
jare fr. fr. 400.- aŭ egalvaloro

Ricevas la abonojn:
En Francujo: R. Flquet, Poŝta
konto 2259-98 Marseille

Alilande: Ĉiuj Ĉefdelegitoj kaj lan-
daj Perantoj de UEA
PETU SENPAGAN SPECIMENON

Redakcio: Administracio:
7, Av. Léon-Gourdault 5, Bd. Stalingrad
Cholsy-le Roi (Seine) Nice (A-M)
Francujo.

Gramofonaj diskoj de UEA

En decembro aperis:

BOLOGNA 1955. SALUTPAROLADOJ
de 23 diversnaciaj reprezentantoj.

JUS APERIS:

LA KULTURA VALORO DE LA INTER-
NACIA LINGVO

de Prof. D-ro Ivo Lapenna.

Speco de diskoj: 45 r.p.m.

Prezo por ĉiu disko (kun aldonita presita teksto)
6 guld.

Mendu ĉe U.E.A.

La Novajn POŝTMARKAJN KATAĴOJOJN

de Zumstein, Michel, Borek kaj Wrona liveras al vi:

INTERNACIA POŝTMARKA KOMERCO

A. NEUSSNER, Berlin N 65, Nazarethkirchstr. 48, Germanio

Ni ĉiam aĉetas novajn, neuzitajn eldonojn de Bulgario,
Ĉeĥoslovakio kaj Pollando



FERIU en Kimrujo,
en BARRY,

Glam. la marban-
loko ĉe la Bristol-
Ŝanelo. - Unu- kaj
dulita ĉambroj,
tutjare, konvena
situo. Verdstelujo.

Demandu informojn
de Ge-Zeiner,
26, Canon-st.

Presita en Nederlando ĉe Zwagers, Rotterdam